


EL POPOLA ĈINIO

中國新道

2

1999

ISSN 0032 - 4361



En edziĝtago

Vivo de maljunuloj

En tagoj kun japanaj

esperantistoj (D)



Gaja sledado en Juraso Montaro

de DIETER ROOKE (Svisio)

Nia asocio "Groupe Esperantiste du Maine" regule legas vian revuon. De longe mi volus peti de vi etan komplementon, kiu certe faciligus la komprenon de kelkaj artikoloj. Tute simple, ni ŝatus havi piednotojn klarigantajn specifajn vortojn aŭ esprimojn: ekz. "baj-a dancistino", "taj-a danco" kaj "ji-aj moroj".

JACKIE HUBERDEAU (Francio)

Mi amatore okupiĝas pri kreskado de fruktarbaretoj kaj floroj. Se en via revuo estus publikigitaj simplaj artikoloj pri kreskado de rozoj, mi estus dankema. Mi ege interesiĝas pri psikologio. Mi legis, ke en Ĉinio multaj homoj vivas longan vivon, centjaran kaj pli. Kial?

A. BRAZAUSKAS (Litovio)

La konkurso de EPĈ-legado tre plaĉas al ni, kvankam la demandoj estis tre malfacilaj. Laŭ mia intereso, la tre interesaj temoj en numero 7/1998 estis: "Budhismo en Tibeto", "Iam dezerta monto verdigita", "La ĉielo en la okuloj de antikvaj ĉinoj", "Vivo estas en alia loko", "Esperanto en koncentrejo", "Du humuraĵoj" kaj aliaj.

RÖVID MAGDOLNA (Jugoslavio)

En la aŭgusta EPĈ elstare plaĉis al mi la foto "Boaco kun sia mastro" (p. 42). Kun bedaŭro oni alvenis al fino de la ekskurso tra la Silka Vojo.

G. O. VASKE (Brazilo)

El la 5-a numero de EPĈ mi tradukis artikolon "Sanprotekto de maljunuloj", kiu aperis en "Victoria regia", semajna gazeto de Slovakio.

S. BARTOVIC (Slovakio)

Ege mi petas vin laŭeble aperigi artikolojn pri sciencfikcio. Speciale mi ŝatus, se vi publikigus liston de ĉiuj ĉinaj sciencfikciaj verkoj, kiuj iam aperis en Esperanto.

T. MEISSNER (Germanio)

El Popola Ĉinio

2 [485] 1999



Ludo de draka lanterno
Foto de Zhou Hao


Ĉinoj havas la kutimon ludi drakan lanternon en festotagoj, en vilaĝoj kaj urbetoj. Por peti favoran veteron por riĉa rikolto, la antikva ĉina popolo kreis figuron de drako kun kapo de fabela monstro, korpo de serpento, ungoj de aglo kaj vosto de fiŝo. Oni faras skeleton de draka lanterno el bambuo kaj ferdratoj kun silka aŭ tola eksteraĵo. Ĝenerale ludas 8-10 personoj. Estas malsamaj ludmanieroj en malsamaj lokoj, tamen interesaj.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"
Distribuata de Distribuata Fako de "El Popola Ĉinio"
Direktoro: Wang Xifu
Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808
Retpoŝto: epc@china-report.com
Hejmpaĝo: <<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

ENHAVO

- | | | | |
|----|---|----|--|
| 2 | INTER NI | 30 | Kolektanto de porcelanaĵoj pri "Ruĝdoma Songô" |
| 4 | En edziĝtago | 32 | JUNULARO: Pekino, urbo preferinda |
| 6 | EKONOMIE: Esploro kaj disvastigo de hibridigita rizo; Helpo el la internacia socio; Kurantaj aferoj | 35 | Transloĝiĝo de strutoj |
| 8 | En tagoj kun japanaj esperantistoj (I) | 36 | Dum la batalo kontraŭ inundo |
| 10 | ĈINAJ E-ISTOJ: Esperanta filatelaĵo akompanas lin | 38 | TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ: Defie al dezertiĝo |
| 11 | POR KOMENCANTOJ: Li iris tro malproksimen | 41 | Tajĝiĉjŭan-prezentado |
| 12 | Intervjuo kun s-ro Keppel Enderby, nova prezidanto de UEA | 42 | MULTNACIA ĈINIO: Posteuloj de la maro |
| 14 | ESP-NOVAĴOJ | 43 | KORESPONDI DEZIRAS |
| 15 | Mi faris fotojn por Banĉen-lamaoj la 10-a kaj la 11-a | 43 | AMUZO |
| 17 | La vivo de Banĉen Erdini la 11-a | 44 | Vivo de maljunuloj |
| 20 | Serĉado de antimaterio | 46 | EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 21 | HOMARO KAJ NATURO: En Yuanyang | 48 | Avo kaj nepo (Novelo) |
| 24 | Facetoj de kulturo de Hongkong | 51 | ĈINAJ METIARTAĴOJ: Filigrana emajlaĵo — vinujo sur anaso |
| 24 | Bela lando — Francio | 2 | FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ: Gaja sledado en Juraso Montaro |
| 28 | Kuriozaj moroj en manĝado | | SUR LA DORSKOVRILO: Gasto-bonveniga Pino sur Huangshan-monto |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|----------------------|-----------------------------|
| 1. Fangcheng (p. 42) | 4. Yunnan-provinco (p. 28) |
| 2. Tianjin (p. 14) | 5. Interna Mongolio (p. 38) |
| 3. Hongkong (p. 24) | |

En edziĝtago

- Elekti bonaŭguran tagon por okazigi nupton
- Edziĝtago, kiun akompanas floroj, taksia procesio, eŭropstila novedzina gazrobo, ringo de geedziĝo
- Ankaŭ neluksa nupto tre ŝatata

de PANG NAIYING

EDZIĜO estas plej ĝojinda por la ĉinoj en la vivo. En la edziĝtago regas granda gajeco kaj malsamas ceremonioj por ĝin festi. Donacante memoraĵon aŭ monon al la novgeedzoj, oni diras al ili: "Gratulon al vi!" Kaj la geedzoj: "Koran dankon!"

TAKSIOJ EN EDZIĜTAGO

Multaj ĉinoj kredas, ke geedziĝo en bonaŭgura tago garantias al la geedza paro feliĉon dum ilia tuta vivo. En la pasinteco, por elekti bonaŭguran tagon oni petis helpon de divenisto. Demandinte la gefianĉojn pri la jaro, dato kaj horo de ilia naskiĝo, li divenis la edziĝtagon plej favoran al ili, en kiu la dio de la feliĉo kaj la gepatra domo de la fianĉo sin trovos en sama direkto. Sed nun estas facile elekti bonaŭguran tagon. Taŭgas kiu ajn dato, se ĝi entenas la ciferon 8 aŭ 9, kaj la oka aŭ naŭa monato de la jaro estas multe ŝatata, ĉar 8 prononciĝas ĉinlingve kiel *ba*, kiu homonimas al la ĉina vorto *fa* (riĉiĝo), kaj 9 — kiel *jiu*, kiu homonimas al la ĉina vorto *jiu* (longe). De aŭgusto, 1998, sur stratoj de Pekino navedis taksioj por bonvenigi novedzinon kaj ŝiajn akompanantojn.

Procesio de taksioj, luitaj senescepte de familianoj de la novedzo, konsistas el 8, kaj iam, el dekoj

da aŭtoj. Kaj la unua personaŭto, kiel vojgvidanto, estas ornamita per floroj kaj granda ideogramo el ruĝa papero kun la signifo de duobla ĝojo.

De la lastaj jaroj furoras la



Interŝanĝo de fingroringoj

nomita procesio. Antaŭe, oni uzis palankenon por bonvenigi novedzinon. La novedzino sidis en la ruĝbrodaĵa kamero sur la palankeno, ŝultre portata de 8 fortuloj per lignaj stangoj. Akompanate de tamburado kaj gongado, la palankeno eniris rekte en la domon de la novedzo. Kun malapero de palankeno eksmodiĝis ankaŭ la rilata ceremonio. Nun personaŭto anstataŭis palankenon, kio favoras taksi-kompaniojn. Ĝenerale, en la



Feliĉa momento

bonaŭguraj tagoj multaj taksioj estas uzataj por nupto.


LAŬMODAJ NUPTOJ

En 1840 reĝino Viktoria en blanka gazrobo aperis en sia nupto. Poste, la eŭropstila novedzina gazrobo modiĝis en la nupto de la Okcidento. En la 30-40-aj jaroj ankaŭ en Ĉinio ekfuroris la moro por novedzino porti tian robon en nupto. De la lastaj jaroj la gazrobo estas multe ŝatata de novedzinoj. Ili portas ĝin ne nur en la geedziĝa ceremonio, sed ankaŭ sin fotas en ĝi kontraŭ miloj da kaj eĉ dekmilo da juanoj. Iu novedzino diris: "Kun paso de tempo mi fariĝos maljunulino. Tamen, sur la foto mi estos juna por eterne." Ŝia patrino diris: "Geedziĝo okazas nur unufoje en la vivo. Nun ni vivas bone kaj ni intencas soleni la nupton de nia solfilino."

Populariĝas ankaŭ nupto en granda hotelo. Nuptoj ne estas tute samaj. Al iuj plaĉas eŭropaj ceremonioj, kie estas muzikludo, mal-

longa parolo de geedziĝ-atestanto, interkonsento de novgeedzoj pri dumviva edzeco kaj ties interŝanĝo de fingroringoj. Kompreneble, tio ne estas ĉio. Iu novedzino donacis al sia edzo la ŝuetojn, kiujn ŝi portis en la tempo, kiam ŝi lernis ira-

vetkuron en la nupto. Laŭ interkonsento, kiu sukcesos en la kuro, tiu mastros la familion. Kompreneble, la novedzo kuris pli rapide ol la edzino. Neatendite, kiam li estis atingonta la finon, li subite returnis sin kaj, preninte ŝin en la brakojn,



don, kiel simbolon de dumviva edzeco: "Mi, kiu portis la ŝuetojn siatempe, plenkreskis kaj de nun akompanos vin dum la tuta vivo." Al aliaj plaĉas antikvaj ĉinaj ceremonioj, kiaj riverenco al la ĉielo, tero kaj gepatroj kaj reciproka riverenco de la novgeedzoj mem.

Laŭmodaj nuptoj profitigas komercistojn. Oktobre de 1998 multaj kompanioj de Ŝanhajo kune okazigis nupton por 999 paroj da novgeedzoj kaj donis al ili servojn pri aĉeto de domo kaj dotoj, mendo de geedziĝa festeno, ekskurso en la miela tempo kaj asekuro. Samtempe kun tio, 36 paroj da ĉinaj novgeedzoj turismis sur la insulo Pulau Sentos de Singapuro. Kiam iliaj vestoj kaj ŝuoj estis malsekigitaj de akvo ŝprucinta el la Fontano de Feliĉo, alinome, Fontano de Riĉaĝo, iliaj nomoj videblis sur la akvo-ekrano per laser-radioj...

EN MIELA TEMPO

Paro da novgeedzoj faris

pafis sin al la fino. Nun en Ĉinio multas tiuspecaj gejunuloj. Ili, liberaj de rutinaj kutimoj kaj strebomaj al afekcioj, okazigas sian nupton sur Gobio kaj krutaĝo, en la aero kaj sub akvo kaj komencas la mielan tempon per paraŝutado, subakviĝo kaj dekrutaĝa saltado malsupren.

"Efektive, ni ne intencas partoprenigi tiom da personoj en monotona nupto en hotelo," diris iu novedzino. Timema, ŝi tamen el-lernis suprengrimpadon sentime en sia miela tempo. "Mi tion faris kune kun mia edzo. Mi kredas, ke kun li mi timos nenium malfacilon en la vivo."

"La moderna socio plenas de intensaj konkurencioj kaj streĉa vivritmo. Mi bezonas ripozon. Mi deziregas vojaĝi al Tibeto. Por havi longan libertempon mi decidis edziniĝi," diris junulino, kiu deziris edziniĝon kaj samtempe timis ĝin. En la miela tempo la pejzaĝo de neĝkovrita regiono kaj ĉelokaj naciaj moroj sentigis al la novgeed-

za paro la esencon de la vivo: Ordinareco estas vivo. Hejmen reveninte, ili prenis ordinaran manĝon en la malgranda restoracio Hejmloko kaj ekhavis la senton esti hejme.

Alia paro da novgeedzoj diris: "Niaj gepatroj preparis ĉion kaj ni ne sciis, kion ni devas fari mem. Ni do decidis pasigi la mielan tempon en la dezerto Taklimakan, alinome, maro de la morto, en nordokcidenta Ĉinio. Kune kun turisma grupo ili transiris la dezerton Lop Nur sur la antikva Silka Vojo. En la geedziĝa nokto ili ne estis akompanataj de floroj, vino kaj siaj parencoj, tamen ili kvazaŭ aŭdis la severan averton de la naturo: "Se vi volas gefilojn, amu ĉiujn estaĵojn en la naturo."

Eble tiuj gejunuloj estas pledantoj por neluksa nupto. Laŭ ili, nupto devas esti modesta, sed diferenca de tiu en la 50-70-aj jaroj. Tiam novgeedzoj faris registriĝon ĉe instanco pri geedziĝo kaj regalis siajn parencojn kaj amikojn per bombonoj, kio finis la nupton. Laŭ statistiko, en la 50-60-aj jaroj ĉiu paro da novgeedzoj en Ĉinio elspezis averaĝe 362 juanojn por geedziĝo, en la 70-aj jaroj 1.3 mil juanojn, en la 80-aj jaroj 5.5 mil juanojn kaj en la 90-aj jaroj 21 mil juanojn. En 1998 la elspezo por tio estis inter 50 mil kaj 200 mil juanoj. Plejparto de la pledantoj por neluksa nupto estas bone salajrataj intelektuloj. Ili opinias, ke la idealaj edzeco ne sin bazas sur eŭropstila novedzina gazrobo kaj luksa festeno. Ili alte taksas la aktualan signifon de geedziĝo.

La lastan oktobron 33 paroj da novgeedzoj de Jiangsu, Ĉinio, donacis monon el sia kaso de geedziĝo por plifirmigi la grandan digon de Yangzi-rivero. Paro da novgeedzoj okazigis sian nupton sur la granda digo de Yangzi-rivero. Vizaĝe al la torenta inundo, la novedzo, kiel batalanto kontraŭ la inundo, donis savjakon al sia novedzino. Surmetinte ĝin sur sin, ŝi tuj komencis sian mielan tempon kaj aliĝis al la vico de batalantoj. ■

Esploro kaj disvastigo de hibridigita rizo

de JI PING

SOMERON, en Hejiang, Guangdong-provinco, sur 800 hektaroj da kampoj kreskis hibridigita rizo kun dikaj folioj kaj grandaj spikoj.

Rigardante la kampojn, Yuan Longping, fama ĉina fakulo de hibridigita rizo, emocie diris: "Tiu ĉi rizkultura revolucio montras, ke la ĉinoj povas per si mem solvi la problemon de manĝado, dank' al scienco kaj tekniko."

Rizo estas tipa mempolenanta planto monoklina. En la 70-aj jaroj Yuan Longping estis okupata de agrikultura scienc-tekniko en Hunan-provinco. Sugestite de genetiko, li ekhavis la ideon: Se sorgo



Provizejo de trinkakvo

kaj maizo povas esti hibridigitaj, ĉu ankaŭ rizo povas? Li do ekokupiĝis pri hibridigo de rizo.

Por serĉi rizan masklon malfekundan Yuan Longping kun siaj kolegoj vizitis preskaŭ ĉiujn lokojn de suda Ĉinio kaj trovis unu tian sovaĝan planton. El ĝi ili kulturis hibridigitan rizon kun granda supereco tiurilata kaj prove kultivis

ĝin surkampe. Oktobron de 1973 estis deklarite al la mondo, ke sukceso la eksperimento de riza hibridado. Rezulte de tio, Ĉinio pliiĝis en 1987 la produkto-kvanton de rizo je 15 miliardoj da kilogramoj kaj la hektaran produktokvanton de hibridigita rizo je 50%-75%.

Yuan Longping per sia scienc-teknika frukto kontribuis ne nur al Ĉinio, sed ankaŭ al la tuta mondo. Pro tio li gajnis grandan honoron. Usona dokumenta filmo pri la hibridigita rizo diris: "Sinjoro Yuan Longping solvis la problemon de manĝado al ĉiuj popoloj de la mondo." Japano diris: "La hibridigita rizo de Ĉinio venigis ŝtormon al Japanio."

Nun, kiel membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj, Yuan preparas sin por fondi la Hunan-an Instituton pri Hibridigita Rizo. Por subteni lian esploron la ĉina ĉefministro decidis asigni al li sumon da mono. Lastatempe venis la informo, ke lia novekulturita vario de hibridigita rizo rikoltigis pli ol 12 000 kg hektare. ■

de ZHENG ZHENJIE

LA akvoriĉa Zhanghe-rivero trairas la gubernion Shexian, al kiu tamen mankis akvo pro tio, ke la riverlito sidas en la plej malalta valo de la gubernio. Pro akvomanko Shexian estis unu el la plej malriĉaj gubernioj de Hebei-provinco.

La 1-an de decembro 1991, esplorinte la gubernion, la membroj de la Monda Nutraĵo-programo de UN decidis helpi la lokanojn sin liberigi el malriĉeco. Tial ekfunkciis agrikultura ekspluata programo n-ro 3737. La programo, kies praktiko daŭris 6 jarojn, konsistis el solvo de trinkakva malfacilo, superrego de grunda erozio, forstumo, konstruo de ŝoseoj kaj ŝtupar-kampoj. Por praktiki la programon, krom la senpaga greno liverita de UN, la ĉina registaro an-

Helpo el la internacia socio

kaŭ asignis grandan sumon da mono kaj sendis multe da administrantoj kaj laborantoj.

Jaroj pasis kaj granda ŝanĝiĝo okazis en la montregiono de la gubernio. En la vilaĝo Wangjinzhuang videblas bonordaj ŝtupar-kampoj. Kamparano diris al mi, ke por preventi mont-inundon, ĉe ĉiu kampopeco la vilaĝanoj konstruis dutavolan ŝtonbaraĵon.

Por kolekti teron la montanoj faris penigan laboron. Ĉu sur la monto, ĉu en la valo, tero estas malfacile trovebla. Per pioĉo kaj ŝovelilo ili elgratis teron el rok-fendoj kaj forkribis gruzojn. En la 6 jaroj la vilaĝanoj de Wangjinzhuang konstruis dutavolan ŝtonbaraĵon kun totala longo

de 250 kilometroj kaj pliiĝis ŝtupar-kampojn je pli ol 30 hektaroj.

La iamaj sterilaj montoj fariĝis verdaj. En 1997 la gubernio Shexian produktis grenon de 93 195 tunoj, je 59.3% pli multe ol en 1991. En la lokoj, kie funkciis la programo, realiĝis grena memsufiĉeco.

Samtempe la programo ankaŭ gajnis bonan efikon socian kaj ekologian. Ekz., la projekto pri trinkakvo solvis por la lokanoj la trinkakvan malfacilon alfrontatan de generacio al generacio.

La programo n-ro 3737 montras subtenon de la internacia socio al la laboro helpi malriĉulojn en Ĉinio, kies nombro malkreskis de 250 milionoj en 1978 al 58 milionoj nun. ■



La ŝipo Changmeng en Yantian-haveno

KURANTAJ AFEROJ

● En Tarim-baseno de Xinjiang ĉinaj prospektoroj trovis olekampion kun rezervokvanto de cent milionoj da tunoj da nafto. Tio estas la plej grava trovo de post 1984, kiam komenciĝis ole-ekspluatado en Tarim-baseno.

● Ĉinio decidis iom post iom praktiki la politikon trakti entreprenojn investitajn de alilandanoj same kiel ĉinajn. Ekz. en Hubei-provinco, tiaj entreprenoj ĝuas ne nur saman trakton en trafiko, liverado de akvo, elektro, hejtaĵo ktp., kiel ĉinaj, sed ankaŭ egalan pagon por manĝado kaj loĝado, domaĉetado, kuracado, lernejo-vizitado de infanoj, biletoj por veturado kaj vizito de parkoj, kiel la lokanoj.

● Ĝis septembro de 1998, en

Ĉinio superis 20 milionojn la nombro de uzantoj de moveblaj komunikiloj. Laŭ kalkulo ĝi atingos 45-50 milionojn en 2000.

● En Ĉinio la kvanto de ekspluatabla hidroelekto estas 378 000 000 kilovattoj, kaj jara produktokvanto de elektro estas 1 920 miliardoj da kWh. Tamen nun la hidroelektra ekspluatita procento estas nur 14%. En la venontaj jaroj la ĉina registaro rapidigos hidroelektran ekspluatadon, prenante kiel la ĉefan punkton la konstruadon de grandaj hidroelektrajoj kaj alispecaj elektrejoj.

● La ekonomia ekspluata distrikto Xiaocuo de Quanzhou, Fujian-provinco, estas grava petrol-kemia industria bazo de Ĉinio. En la distrikto ĉinoj kaj alilandanoj

rekonstruas kaj pligrandigas per granda monsumo la Fujian-an Petrol-rafinan Kompanion, por ke ĝia jara petrol-rafina kvanto atingu 12 000 000 tunojn. Laŭ kalkulo, en 2003 ekfunkcios la instalaĵoj, kiuj povos produkti jare 600 000 tunojn da etileno, 450 000 tunojn da polietileno kaj 300 000 tunojn da polipropileno kaj rilataj ekipaĵoj por vendado.

● La 16-an de oktobro 1998 la ŝipo Changmeng de la Taiwan-a Martransporta Limigita Kompanio Changrong atingis Yantian-havenon de Shenzhen, transirinte Taiwan-markolon. Ĝi estas la unua granda kontener-ŝipo, kiu marveturis inter gravaj havenoj de la ĉeftero, Hongkong kaj Taiwan de Ĉinio en la pasintaj 48 jaroj.

En tagoj kun japanaj esperantistoj (I)

de WANG HANPING

FLUGO AL NAGOJO

Je la 1-a de oktobro 1998, la Nacia Festo de Ĉinio, mi forlasis Pekinon por viziti Japanion, kaj komenciĝis mia unumonata vojaĝo en la japana Esperantujo.

Jam en la knabeco mi konis Japanion kaj revis viziti tiun najbaran landon. Antaŭ 10 jaroj mi eklaboris en la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj konatiĝis kun multaj japanaj esperantistoj. De ili mi pli multe konas Japanion, la vivon de japanoj kaj la japanan Esperanto-movadon. Dank' al la afabla invito de sino Morita Yoko, mi realigis mian revon viziti Japanion kaj spertis ĝian viglan Esperanto-movadon.

Mia flugo startis de la urbo Tianjin, proksime de Pekino. Post 2 horoj mi jam atingis Nagojon. Tio estis pli rapida ol mia iama enlanda vojaĝo. Kiam mi kun ĝojo iris al la elirejo, de malproksime mi vidis s-rojn Ikai Yosikazu, kun verdstela flago en la mano, kaj Nagase Yosikatu, prezidanton de la Nagoja Esperanto-Centro. Estis s-ro Nagase, kiu prizorgis mian ĉifojan vojaĝon. Ni jam konatiĝis per



"Kalkulo de vivjaroj" ludata dum la kongreso

telefono kaj fakso. Antaŭlonge Aichi-gubernio kaj ĝia ĉefurbo Nagajo kaj mia hejmprovinco Jiangsu kaj ĝia ĉefurbo Nankino jam fariĝis ĝemelaj regionoj kaj urboj. Forlasinte la flughavenon, ni unue vizitis la sporthalon de Aichi-gubernio, kiu famiĝis pro "tablotenisa diplomatio",* kaj poste ni rigardis du ornamajn kolonojn starigitajn en la urbocentro, kiuj estis donacitaj de Nankino.

En la vespero mi vizitis la Nagojan Esperanto-Centron. La centro ne estas granda, tamen ple-

na de Esperanta etoso. Ĝi estas hejmo de nagojaj esperantistoj. S-ro Nagase ĉiutage laboras tie. En la bankedo, okazigita de nagojaj esperantistoj por bonvenigi min, mi konatiĝis kun prof. Morita Akira, s-ro Renzan Sugihara, s-ro Suzuki Joŝihiko... Kune kun nagojaj esperantistoj mi tiel pasigis la Nacian Feston de Ĉinio.

85-A JAPANA ESPERANTO-KONGRESO


Antaŭtagmeze de la 3-a, s-ro Ikai veturigis min kaj s-ron Nagase al la havenurbo Kanazawa en Hokuriku. Dum veturado ni ĝuis belajn pejzaĝojn. Kiam ni atingis la Kulturenan Halon de Kanazawa, kongresejon, jam estis la 1-a posttagmeze. Ni unue venis al la eksponejo en la unua etaĝo. S-ino Morita kaj s-ro Aoki jam tie atendis nin. Ni kune vizitis la riĉan ekspozicion pri la Esperanto-movado de Hokuriku.

Posttagmeze de la 3-a, en la Halo Zamenhof inaŭguriĝis la kongreso per forta frapado de japana tamburo kaj kantado de "La Espero". Prelego de la Kongresa Universitato kaj iuj aliaj programoj jam komenciĝis antaŭ la inaŭguro. S-

ro Kawanisi Teturo, eminenta japana Esperanto-oratoro, kaj aliaj du s-anoj prezidis la inaŭguron. Unue s-ro Yamasaki Seiko, prezidanto de la estraro de la Japana Esperanto-Instituto (JEI), salutis la kongreson, kaj s-ro Inumaru Fumio raportis pri la japana Esperantomovado. La temo de la kongreso estas "Ni agu kiel homaranoj por la terĝlobo". Oodati Kaoruko, juna esperantistino el Kanazawa, festoparolis Esperante laŭ la kongresatemo pri difektado de la natura medio de sia loĝloko. Tio altiris la atenton de la kongresanoj. Krom pli ol 400 japanaj esperantistoj, ankaŭ esperantistoj el aliaj aziaj landoj kaj Eŭropo partoprenis la kongreson. La Esperanto-Societo de Kanazawa aparte invitis 3 esperantistojn el Suzhou, Ĉinio, ĝemela urbo de Kanazawa.

Post la inaŭguro prof. Lee Chong-Yeong faris prelegon "Esperanto kaj la 21-a jarcento". La deklamado de Matuda Yoko kaj teatraĵo "Kalkulo de vivjaroj" ludata de tri personoj, sur fono de Zamenhofa kariero, ricevis varman aplaŭdon.

Samkiel la antaŭaj kongresoj, ankaŭ la ĉi-foja okazis en sabato



Libroj eldonitaj de la Ĉina E-Eldonejo ŝatataj de nagojaj e-istoj

en Azio", mi ĉeestis la kunsidon "Azia Agado". Post la fondiĝo de la Komisiono pri Azia Esperantomovado, la kunsido fariĝis konsekvenca.

"El Popola Ĉinio" havas multajn legantojn en Japanio. Laŭ aranĝo de la Loka Kongresa Komitato kaj sub helpo de s-ro Nagase, mi okazigis kunsidon de EPC-legantoj. La kunsidon ĉeestis ne nur

malnovaj, sed ankaŭ novaj legantoj. Ili donis proponojn por plibonigo de la revuo. Iuj sugestis, ke en Japanio oni starigu amikan societon de EPC-legantoj kaj okazigu ekspozicion de ĉinaj eldonaĵoj en Esperanto. Nia multjara leganto sino Naka Hagiwara ne estas riĉa, tamen ŝi donacis

20 mil enojn al Fondaĵo EPC-abono. Iuj tuj abonis la revuon ĉe libroservo. La subteno kaj helpo multe kuraĝigis min.

Ankaŭ la fermo, okazinta en la posttagmezo de la 4-a, estis sole-na, varma kaj simpla. Oni faris

resumon pri la kongreso. JEI donis al s-ro Huzimaki Ken'iti Premion Ossaka por 1998 pro lia longjara kaj altnivela laboro en la kampo de instruado. Ĝi honoris s-ron Ito Kanzi per speciala honoro laŭ akademia merito, ĉar dum longaj jaroj li dediĉis sian energion al la editorado de "Plena Verkaro de Zamenhof". Fine s-ro Yamamoto Sintaro, loka organizanto de la venonta kongreso en Motizuki de Nagano, transprenis la kongresan flagon de esperantisto de Kanazawa. La kongreso fermiĝis per kantado de "Tagiĝo".

La kongreso estis mallonga, tamen ĝi impresas min per siaj perfekta organiza laboro kaj enhavoriĉaj programeroj. Mi bedaŭris, ke mi ne havis sufiĉan tempon por ĉeesti tiel multajn bonajn kunsidojn, alie pli multaj brilaj programeroj kaj kapablaj kaj entuziasmaj japanaj esperantistoj aperus en mia artikolo. ■

* Septembre de 1971 tie okazis la 31-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso, en kiu la amika kontaktiĝo de ĉinaj kaj usonaj sportistoj komencis la degelon en diplomatiaj rilatoj de Ĉinio kaj Usono.



Kunsido de EPC-legantoj

kaj dimanĉo. La 2 tagoj de la kongreso estis riĉaj je programeroj. Antaŭtagmeze de la 4-a, 20 fakaj kaj aliaj programeroj samtempe okazis. Laŭ invito de s-ino Doi Ĉieko, konstanta kongresa sekretario kaj redaktoro de "Esperanto

Esperanta filatelaĵo akompanas lin

de YIN QIN

LA 76-jara Qin Kaiji estas mal-dika, kun blankaj haroj kom-bitaj malantaŭen. Li malofte ridas, tamen kiam li parolas pri Esperanto kaj Esperanta filatelaĵo, li

En 1951 li venis al Pekino kaj eklaboris profesie por "El Popola Ĉinio", poste li laboris en la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji Shudian) ĝis emeritiĝo.

Qin Kaiji verkis kaj tradukis pli ol 100 artikolojn, kiuj estis

li eklernis Esperanton, li korespondis kaj interŝanĝis poŝtmarkojn kun esperantistoj en- kaj eksterlandaj. Li iam studis la rusan lingvon. Fine de la 50-aj jaroj li elrusigis pli ol 20 artikolojn por la ĉina revuo "Filatelo". De tiuj artikoloj li informiĝis pri la kulturo



Qin Kaiji (meze) en ekspozicio de siaj filatelaĵoj

vigliĝas. Li diris, ke Esperanto estas grava parto de lia vivo kaj pli kaj pli graviĝas por li.

En juneco li forlasis malsuperan mezlernejon pro malsano. En la hejmo li memlernis Esperanton. En la sekvaj 3 jaroj de 1942 en Chongqing, ĉiusemajnfine li vizitis la Chongqing-an Esperantan Korespondan Lernejon, kiun gvidis fama ĉina e-isto Venlo Fon. En tiuj tagoj li konatiĝis kun fama japana esperantistino Verda Majo kaj ricevis ŝian helpon en la lernado de Esperanto.

publikigitaj en revuoj ĉinaj kaj alilandaj. Li ankaŭ partoprenis en kompilado de kelkaj Esperantaj vortaroj, inkluzive de Esperanto-Ĉina Vortaro.

Post kiam li emeritiĝis en 1984, li tutkore disvastigis Esperanton. Dum 1984-1986 li invitite instruis Esperanton en universitatoj de Kunming, Yunnan-provinco.

Qin Kaiji ŝatas filatelon. En la Pekina Filatela Grupo de Esperanto li estas la plej aktiva. En 1994 li kunfondis la Ĉinan Filatelan Esperanto-Asocion. De 1939, kiam

kaj historio de Rusio.

En 1985 antaŭ la 1-a Ĉina Kongreso de Esperanto, Qin Kaiji iniciatis memorigan koverton kaj skribis por-okazajn vortojn. La memoriga koverto fariĝis la unua formala Esperanta filatelaĵo de Ĉinio. En 1989 okaze de la 130-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, Qin Kaiji iniciatis poŝtkarton por rememorigi pri Zamenhof, sur kiu estas presitaj 15 poŝtmarkoj pri portretoj de Zamenhof kolektitaj de li. En la lastaj dekkelkaj jaroj li iniciatis pli ol 40 filatelaĵojn por

Li iris tro malproksimen

de LIU YANMIN

MI iam legis rakonton pri avidulo: Bienulo vizitis tribestron por peti de li terpecon. Tiu tamen diris: "Iru okcidenten kaj faru markon tie, kien vi atingos. Se vi revenos antaŭ la sunsubiro, do la tero inter ĉi tiu loko kaj la marko apartenos al vi."

La suno subiris, sed la bienulo ne revenis, ĉar li iris tro malproksimen kaj mortis de laco survoje.

La bienulo ne revenis pro avideco. Sed en la reala vivo estas ankaŭ aliaj homoj, kiuj ne povas reveni, kvankam ne avidaj.

Foje, mi volis alnajli pentraĵon al muro en la salono. Mi petis helpon de mia najbaro. Ĝuste kiam mi volis enbati la najlon, la najbaro proponis: "Estus bone, se vi trovus du pecojn da ligno kaj pendigus la pentraĵon sur ili najlitaj." Mi akceptis lian proponon kaj petis lin serĉi lignopecojn.

Post kelkaj minutoj li trovis la bezonatajn lignopecojn. Mi estis enbata tonta la najlon, sed la najbaro diris: "Momenton! Ŝajnas al mi, ke la lignopecoj estas iom grandaj. Mi forsegu ilin iomete." Li do foriris serĉi segilon. Apenaŭ li komencis segadon,

li diris: "La segilo estas malakra kaj mi akriĝu ĝin."

Li havis akriĝilon en sia hejmo. Li prenis ĝin kaj trovis, ke ĝi ne havas tenilon. Por havigi al ĝi tenilon li eldomiĝis por serĉi arbeton. Kiam li levis mian hakilon por faligi la arbeton, li rimarkis, ke la rusta hakilo tute ne uzeblas. Por senrustigi ĝin li devis havigi al si akriĝan ŝtonon. Por faciligi la akriĝadon li devis fiksi la ŝtonon, tial li bezonis kelke da latoj. Li do iris al lignaĵisto, asertante ke tiu ĉi havas pretajn latojn hejme. Mia najbaro foriris, sed ne revenis.

Sendube, mi fine alnajlis la pentraĵon al la muro laŭ mia maniero. Posttagmeze mi vidis la najbaron surstrate, ke li helpas la lignaĵiston elporti grandan elektran segilon el vendejo. Videble, li jam tute forgesis min helpi alnajli la pentraĵon al la muro.

La rakonto konigas, ke sur la vivovojo oni devas de tempo al tempo retrorigardi por scii, ĉu li povas reveni antaŭ la sunsubiro, aŭ simple halti por pripensi, kien kaj por kio li iras. Eble tio estas utila, por ke li ne perdu tre multe. ■



rememorigi pri pioniroj kaj subtenantoj de Esperanto, dume li ricevis multe da subtenoj. Ĉefredaktoro de "La Verda Lupeo", organo de ELF-AREK, laŭdis lin kaj multfoje publikigis liajn raportojn pri filatelaĵoj. Fama ĉina verkistino Bing Xin, en 94-jara aĝo, dediĉis surskribon al lia filatelaĵo. Ĉinaj e-istoj Zhang Linrui en Jiangsu-provinco, Xie Shaoxing kaj Tan Ailing en Guangdong-provinco senpage desegnis por li filatelaĵojn. Qin Kaiji diris, ke ĝis nun li anko-

raŭ ne vidis Xie Shaoxing kaj Tan Ailing. Li kontaktiĝis kun ili koresponde, kaj ilia helpo multe kortuŝis lin.

Nun Qin Kaiji sin preparas por la 120-a datreveno de la naskiĝo de Lusin (1881-1936), fama ĉina verkisto. Pro tio li konsultis multajn materialojn.

En la kelkdek jaroj Qin Kaiji konatiĝis kun multaj esperantistoj. Kiam iuj maljunaj esperantistoj forpasis, li verkis memorigajn artikolojn por diskonigi iliajn kon-

tribuojn por la ĉina Esperantomovado.

En 1991 lia edzino forpasis. Dum la 40-jara kunvivado la edzino, ankaŭ esperantistino, donis al li multe da subtenoj. Li kompilis la vortaron "Esperanto-Ĉinaj Neologismoj" kiel donacon por ŝi.

Nun liaj tri filoj vivas aparte. Sola, li tamen sentas sin libera. Ĉiutage li okupiĝas pri Esperanto kaj E-filatelaĵoj kaj ofte montras siajn filatelaĵojn en Esperantaj kunvenoj kaj renkontiĝoj. ■

Intervjuo kun s-ro Keppel Enderby, nova prezidanto de UEA



K. Enderby kaj lia edzino

de WANG LIHUA

DUM la 83-a UK en Montpellier, Francio, mi havis honoron intervui s-ron Keppel Enderby, novan prezidanton de UEA. En intertempo interkunsidoj li ĝoje akceptis min kaj afable respondis miajn demandojn.

Wang: Unue mi kore gratulas vin, ke vi estas elektita kiel prezidanto de UEA en la Montpeliera Kongreso. Por ke niaj legantoj pli bone konu vin, mi kore petas vin koncize prezenti vin.

K. Enderby: Volonte. Mi naskiĝis en 1926 en malgranda urbeto de Aŭstralio. Mi iam aliĝis kaj servis en la Aŭstralia Flugarmeo. Post tio mi studis juron. Mi

laboris ankaŭ kiel instruisto de juro en la Aŭstralia Nacia Universitato en Kanbero, kiel advokato, juĝisto kaj ŝtatisto. En 1970 mi elektiĝis al la Aŭstralia Federacia Parlamento. De 1972 ĝis 1975 mi funkciis kiel ministro pri justico, ĝenerala prokuroro kaj estrarano de la Aŭstralia Laborista Partio; de 1982 ĝis 1992 kiel juĝisto de la Supera Kortumo de Nov-Sudkimrio, kaj ekde 1987 kiel prezidanto de la Nov-Sudkimria Ŝtata Konsilio pri Revizado de Punoj de Gravaj Kondamnitaj. Dum kelkaj jaroj mi estis prezidanto de la Nov-Sudkimruja Filio de la Aŭstralia Instituto

pri Internaciaj Aferoj.

Mi esperantistiĝis en 1987. Mi ĉeestis fakte mian unuan internacian kongreson en 1988, t.e. la 4-a Pacifika Kongreso, kaj mia unua UK okazis en Kubo en 1990. Post tio mi pli kaj pli interesiĝis pri la lingvo Esperanto. Mi estas membro de UEA kaj SAT, komitatano de UEA ekde 1992, prezidanto de Esperanta Jura Asocio ekde 1996, prezidanto de la Aŭstralia E-Asocio de 1992 ĝis 1998. Sed nun vidu, la vivo estas stranga afero. Mi devas diri, ke mi neniam pensis, ke iafoje mi prezidantiĝos en UEA. Nun tio fakte okazis kaj nun mi estas prezidanto de UEA.

Wang: Viaj movadaj kaj nemo-vadaj travivaĵoj montras, ke vi estas la ĝusta persono por esti prezidanto de UEA sojle de la nova jarcento. Do, mi ŝatus scii, kiujn ideojn



La aŭtoro kaj K. Enderby

vi havas por progresigi la celon aŭ atingi pli inspirajn sukcesojn de la Kampanjo 2000.

K. Enderby: Tio estas demando interesa, sed ne facile respond-



K. Enderby, liaj filo kaj nepo

ebla. Fakte, mia antaŭulo, prezidinto Lee Chong-Yeong, multe faris por progresigi la Kampanjon 2000. Nun estas nur miaj fruaj tagoj de mia prezidanteco, do mi unue devas lerni kaj informiĝi pri la nuna situacio en la Centra Oficejo de UEA. Mi havas multon por lerni. Sed la Kampanjo 2000 estas grava por pli bone persvadi registarajn instancojn de la mondo trakti Esperanton pli serioze ol ili nun traktas ĝin. Oni devas memori ankaŭ, ke en anglalingvaj landoj, ekz. Britio, Usono, Kanado, Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kaj en kelkaj aziaj landoj, kiel Hindio, oni ne volas cedi al iu ajn lingvo. Tio estas granda problemo por esperantistoj en anglalingvaj landoj. Kaj tio malhelpas al ni progresigi la Kampanjon 2000. Prioritate, mi donas gravan rolon al la NRO-j, kiuj nun tiom abundas en la internacia vivo de la mondo kaj la rilatoj de UEA kun ili. Mi esperas venontjare aktivi tiuaspekte rilate al eventoj, kiuj okazos en Azio.

Wang: Vi estas de lando anglalingva. Do, mi tre scivolemas, kion vi pretas fari rilate la egalecon in-

ter lingvoj kaj por starigi novan internacian lingvan ordon.

K. Enderby: La fakto, ke mi devenas de lando parolanta la anglan kaj havas la anglan kiel mian unuan lingvon, probable pli konsciigas min pri la manko de justeco en la internacia lingva ordo ol se mi ne estas tia. Laŭ mi, tio helpas persvadi aliajn pri la maljusteco de la aktuala lingva situacio.

Wang: Mi supozas, ke aziaj samideanoj certe multon atendas de vi, ĉar vi venas de la Azi-Pacifika regiono. Ĉu vi jam elkovis laborplanon por la azia movado? Se jes, kiuj taskoj estas prioritataj?

K. Enderby: Kiel mi jam diris, mi esperas aktivi en la Azia kaj Pacifika regionoj parte pro la fakto, ke ili pli proksimas al Aŭstralio. Mi donu ekzemplon: en oktobro venontjare okazos kelkaj gravaj eventoj en aziaj landoj. Mi mencienu nur tiujn ĉi: Konferenco de Ne-Registaraj Organizaĵoj kun la temo "La rolo de NRO-j en la 21-a jarcento"; la Korea Kongreso de Esperanto; la Japana Kongreso de Esperanto, kaj la Dua Azia Kon-

greso de Esperanto en Vjetnamio. Mi esperas partopreni en almenaŭ iuj el ili.

Wang: Mi aŭdis, ke via edzino estas ne nur bela, sed ankaŭ kapabla. Ĉu ŝi multe inspiras vin en via E-agado? Per kia maniero?

K. Enderby: Vi aŭdis ĝuste, kvankam estas iom embarase laŭdi ŝin tiom publike. Mi diru nur, ke ni estas bona teamo.

Wang: Koran dankon pro viaj respondoj. Mi kore deziras al vi brilajn sukcesojn sur via prezidanta posteno.

K. Enderby: Kun plezuro! ■

IJK en Hongkong en 2000

Hongkong estas akceptita kiel gastiganto de la 56-a Internacia Junulara Kongreso por la jaro 2000. Estas ĝojige, ke Hongkong, kiel parto de Ĉinio, havas la okazon montri sin al la mondo kiel unu el la plej vigle disvolviĝantaj metropoloj de la mondo. La laboraj komitatoj baldaŭ estos starigitaj.

Informoj haveblas ĉe "Loka Kongresa Komitato IJK 2000", p/a Hongkonga Junulara Esperanto-Asocio, P.O. Box 92153, Tsim Sha Tsui Post Office, Kowloon, Hong Kong, Ĉinio. Retpoŝto: hongkongo@esperanto.-nu/hkjea@hotmail.com.

ĈINIO

● La 12-an de decembro 1998 ĉ. 50 pekinaj esperantistoj festis la 139-an datrevenon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. Per kantado de "La Espero" komenciĝis la kunveno gvidata de Tan Xiuzhu, prezidantino de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL). S-ro Zou Guoxiang, vicprezidanto de ĈEL, parolis pri la progreso de la ĉina E-movado en la lastaj 20 jaroj. Prezidanto de la ĉina societo "Amikoj de Esperanto", s-ro Chai Zemin, rememoris sian lernadon de Esperanto en la 30-aj jaroj. Li inspiris la junulojn diligente labori por venki la malfacilojn. Li kredis, ke certe progresos Esperanto en la venonta jarcento. S-ro Hou Zhiping prezentis "Kanton de Esperantistoj", kies tekston li mem verkis. Vigle interparolis du studentinoj de Aŭstralio kun ĉinaj gejunuloj. La Zamenhofa Festo estas ankaŭ Tago de Libro. Libroservo de EPĈ ekspoziciis E-librojn, kiaj "Ruĝdoma Sonĝo", "Sunleviĝo" kaj "Noveloj el Antikva Ĉinio".

● Invitite de la Nutraĵa kaj Agrikultura Organizo de UN, prof. Lee Chong-Yeong, prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio lekciis en la sudorienta ĉina urbo Nankino inter la 5-a kaj 13-a de novembro 1998. Survoje li restis en Pekino unu tagon kaj gastante ĉe EPĈ-redakcio faris prelegon titolitan "Esperanto en la 21-a jarcento — oportunoj kaj defioj". En Nankino li havis tre agrablan renkontiĝon kun lokaj esperantistoj.

● En la 10-a kaj 11-a de oktobro 1998 okazis kunveno de membroj de la Tianjin-a Esperanto-Asocio. En la kunveno oni resumis la laboron de la asocio en la pasinta jaro, honoris aktivulojn kaj elektis novan konsilion de la asocio. Dum la kunveno estis ankaŭ forumo, prelego kaj amuza vespero. Partoprenis preskaŭ 40 membroj, kun 2 samideanoj el Aŭstralio.

FRANCIO

● Fine de 1999 la konata tradukisto, eseisto kaj vortaristo Fernando de Diego fariĝos 80-jara. Por inde omaĝi la jubileulon kaj ties vivo-verkon en la servo de nia traduk-arto, Edition Iltis preparas apartan fest-libron. La prepar-laboroj jam komenciĝis kaj listo de la kontribuantoj nun formiĝas. Kunlabore-

muloj ankoraŭ ne invititaj, bv. kontakti la eldonejon. Same ĉiuj personoj, kiuj deziras enskribiĝi en la Tabula Gratulatoria (Listo de la gratulantoj). Skribu al: Edition Iltis, B.P. 30, F-57520 Grosbliedersstroff, Francio. (Edition Iltis)


SERBIO

● Esperanto Ligo de Serba Respubliko (parto de Bosnio kaj Hercegovino) denove organizis Esperantan renkontiĝon en Prijedor de la 28-a ĝis la 30-a de aŭgusto 1998. Partoprenis ĉirkaŭ 40 esperantistoj el Respubliko Serba kaj Jugoslavio. Ĉefa temo de la renkontiĝo estis "Esperanto sur turno de jarmiloj". Fakte oni parolis pri "Kampanjo 2000". Ĉefdelegito de UEA por Jugoslavio sinjorino Milica Ristiĉ-Dokmanoviĉ subportis antaŭparolon pri Kampanjo 2000. Direktoro de Instituto por Esperanto el Belgrado sinjoro Boriša Miliĉeviĉ parolis ankaŭ pri Kampanjo 2000 kaj pri plano de la Instituto kiel konkreta kontribuo al Kampanjo 2000. Prezidanto de Esperanto-Ligo de Respubliko Serba sinjoro Miĉo Vrhovac raportis pri ĝisnunaj rezultoj de Kampanjo 2000 kaj esprimis opinion ke ĉi tio estas tre grava momento de Esperanta historio. Aparte interesa parto de programo estis promocio de "Antologio de serba poezio (1200-2000)", kiun eldonis Serba Esperanto Ligo. Tio estas la plej granda kaj valora eldono en pasinta tempo en Jugoslavio en Esperanta kampo. La antologio estas aperigita en belegaj kovrilpaĝoj kaj havas 500 paĝojn kun 284 poemoj de 92 aŭtoroj. La sekva renkontiĝo okazos en Tesliĉ de la 22-a ĝis la 24-a de julio 1999. (Esperanto Ligo de Respubliko Serba)

E-renkontiĝo organizita de E-Ligo de Serba Respubliko



Mi faris fotojn por Banĉen-lamaoj la 10-a kaj la 11-a



La aŭtoro kaj Banĉen la 11-a (dekstre)

de CHENG WEIDONG

KIEL fotisto mi iam oficvojaĝis en Tibeto kun Banĉen Erdini la 10-a. Dum 1988-1998 mi funebriis pri Banĉen la 10-a kaj gratulis Banĉen la 11-an pro lia surtroniĝo post la konfirmo de la tiro de loto el ora urno. Kiam mi faris fotojn pri tiuj gravaj eventoj, restis al mi multaj neforgeseblaj rememoroj.

LA LASTAJ FOTOJ

Tuj post la Novjara Tago de 1989, Banĉen la 10-a preparis vojaĝon al Tibeto por inaŭguri la komunan relikvan stupaon por

Banĉen-lamaoj la 5-9-aj. Estis vintro. Multaj persvadis, ke li iru en alia sezono, ĉar oksigeno ege mankas al Tibeto en vintro. Sed li insistis, dirante, ke estas neŝanĝebla la tago de inaŭguro decidita post sutrolegado kaj aŭgurado.

Antaŭ la vojaĝo li preparis por ĉiuj konatoj donacojn, inter kiuj estis liaj fotoj. Donacante ilin, li diris ĉiam kun rideto: "Ne forgesu, ke Banĉen la 10-a estas dikulo." Tiam neniu havis tempon multe pensi pri tio, ĉar liaj 20 tagoj en Tibeto estis plene aranĝitaj. Preskaŭ ĉiutage li povis ripozi nur en profunda nokto. Ĉiu-

foje, kiam liaj kuracistoj volis fari al li korpo-ekzamenon, li, frapante la bruston, diris, ke li tre bone fartas.

Dek tagojn antaŭ lia forpaso mi intervjuis lin. Li parolis en bona humoro pri Congkapa, fondinto de la flava sekto de la tibeta budhismo, pri la forpasintaj Banĉen-lamaoj, kiuj amis kaj la patrolandon kaj la religion, pri la religia politiko de la ŝtato, pri sia ideo disvastigi la tibetan budhismon... Eĉ antaŭvespere de sia forpaso li gaje ĉeestis amuzan vesperon. Vidinte, ke li estas ege ĝoja, mi levigis mian foto-aparaton kaj faris kelkajn fotojn por li. Sed tute ekster mia atendo, tio estis liaj lastaj fotoj.



La aŭtoro kaj Banĉen la 10-a (maldekstre)

"NI FARU DENOVE"

Kvankam Banĉen Erdini la 10-a estis gvidanto de la tibeta budhismo kaj unu el la ŝtataj gvidantoj, tamen li estis alirebla kaj serena. Ĉiufoje, kiam mi volis foti aŭ in-

tervjui lin, li gaje akceptis tion, kaj kelkfoje li eĉ atentigis min pri lumo kaj ŝparo de filmo.

Tiutage, post inaŭguro de la relikva stupao, oni prezentis donacon al li por esprimi respekton. Ankaŭ mi volis tion fari, sed mi portis kun mi nenion alian krom la foto-aparato. Do, mi prenis blankan silkan rubandon kaj diris al li kun rideto: "Majstro, mi nenion preparis, do mi prezentas al vi la blankan silkan rubandon pruntitan ĉe vi." Kiam mi respektoplene prezentis la rubandon al li, li frapetis mian

kapon kaj diris kun rideto: "Vi multe laboris, mi donacas ĝin al vi." Kiam li metis la rubandon sur mian kolon, la lampeto de la foto-aparato ne lumis, ĉar la obturilo rigliĝis. Rigardante la majstron, mi diris: "Bedaŭrinde, la gravan momenton mi ne kaptis." Sed li diris: "Ne gravas, ni faru denove." Mi gaje ridis, kaj sukcesis tiu valora foto kun la majstro.

GRANDA BEDAŬRO

Tiutage la majstro laŭ rito karesis la kapon al la adeptoj, kiuj staris en longa vico. Ĉe la sunsubiro la loĝejon de la majstro lekis belaj sunradioj kaj la majstro en ora tibet-nacia robo aspektis pli granda kaj forta. Mi tre volis foti lin tute solan, sed mi ne povis ĝeni lin. Post kiam li finis sian kareson por la lasta adepto, la suno jam subiris. Li stariĝis, etendis siajn brakojn kaj demandis min, ĉu mi ankoraŭ volas foti lin. Mi respondis kun bedaŭro, ke la lumo ne taŭgas kaj mi faros tion estonte. Du tagojn poste, la majstro forpasis. Tio lasis al mi grandan bedaŭron por mia tuta vivo.



Banĉen la 10-a

Foto de Cheng Weidong

"BELAJ ESTAS LA FOTOJ, KIUJN VI FARIS!"


Tri jaroj jam pasis post la konfirmo de la tiro de loto el ora urno kaj la aprobo de la centra registaro de Ĉinio por la surtroniĝo de Banĉen la 11-a en novembro 1995. Li, viva budho, naskiĝinta sur paŝtejo en norda Tibeto, multe kreskis ne nur fizike, sed ankaŭ intelekto, dank' al siaj instruistoj kaj sutro-edukistoj. En 1996 li ŝramaniĝis laŭ la rigora rito de la tibeta budhismo kaj en 1998 li ricevis verto-aspergon laŭ la doktrino de ĝia esotera sekto. Dum tiuj tri jaroj mi faris multajn fotojn pri aktivadoj de Banĉen la 11-a. Kvankam mi ne havis multe da ŝancoj paroli kun li, tamen li profunde impresis min per sia deca konduto.

Banĉen la 11-a ĉiam aspektas trankvila. Kiam li gvidas budhismajn aktivadojn, li neniom maltrankvilas antaŭ granda amaŝo da homoj. Li recitas la sutron ĝuste, ritme kaj klare, ĉiam kun majstra sinteno.

Li estas infano kun bona memoro. Foje mi konigis al li mian

nomon en han-lingvo. Li ne nur bone memoris ĝin, sed ankaŭ bone prononcis ĝin. Li tre ŝatis la fotojn faritajn de mi, levis ilin kaj kapjesis al mi. Kelkfoje mi instruis al li fari fotojn per mia foto-aparato. Post pluraj kontaktoj, ni pli bone konis unu la alian. Ĉe nia renkontiĝo li salutis min en han-lingvo: "Saluton, Cheng Weidong!" Kaj mi reciprokis en la tibeta lingvo: "*Renbuqin* (signifanta respekto-plenen saluton al la majstro)!" En iu tago de julio 1998 li atenteme skribis sur mia bildkajero en la tibeta lingvo: "Cheng Weidong, belaj estas la fotoj, kiujn vi faris!" kaj bonorde subskribis la kajeron.

Dum la tagoj kun Banĉen-lamaoj la 10-a kaj la 11-a, mi vidis, kiel ili vivis kaj vivas kiel gvidanto de la tibeta budhismo, kaj konis, ke ili vivis kaj vivas vivon tute saman kiel tiu de ordinaraj homoj. Mi karmemoras Banĉen la 10-an, kiu vivos ĉiam en mia koro. Kaj mi kore deziras, ke Banĉen la 11-a sane kresku, heredu la virton de Banĉen la 10-a kaj efektivigu lian ideon. ■



Kun sia frato

La vivo de Bancèn Erdini la 11-a

Fotoj de CHENG WEIDONG kaj QIANGBA CIREN

Pli ol du jaroj jam pasis post la konfirmo per la tiro de loto el ora urno kaj la aprobo de la centra registaro de Ĉinio por la surtroniĝo de Banĉen Erdini la 11-a. Li multe kreskis ne nur en la korpo, sed ankaŭ en klereco kaj instruiteco de budhismo.

Lia sutra instruisto Migmar Shidar diris, ke li estas mirinde saĝa, komprenema kaj diligenta. En la du jaroj li multe legis sutrojn de la tibeta budhismo, ekkomprenis la rigorecon kaj striktecon en studado kaj kulturis en si la amon kaj ĝentilecon al aliaj.

Viva budho Banĉen tre interesiĝas pri kulturaj scioj. Lia tibet- kaj han-lingva nivelo rapide altiĝis.

Ĉiusemajne, li ankaŭ uzas multe da tempo por lerni kaj reciti sutrojn. Li ŝatas pentri kaj sin amuzi per ludiloj. Ĉiutage li faras sporton eksterdome.

En majo 1997 viva budho Banĉen estis vizitata de la mongola viva budho Goru Dewa, kaj en oktobro li prezidis la ceremonion por la deka datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Supera Instituto de Tibeta Budhismo. Li donas grandan atenton al gravaj aferoj de la ŝtato kaj faris kaligrafiajn memore al la reveno de Hongkong en la patrolandon en 1997.



"Lasu min foti!"



"Hodiaŭ estas mia naskiĝtago."



Kun sia sutro-instruisto Migmar Shidar

Kun sia patro



Kun la mongolaviva
budho Garu Dewa



Dum religia aktivado

Serĉado de antimaterio

de LI LIANG

LA homaro ĉiam klopodas serĉi la originon de la universo. Kun progreso de sciencoj kaj teknikoj, la homaro pli multe kaj profunde konas la universon. Tamen la naskiĝo de la universo restas nekonata. La serĉado de antimaterio estas avangarda eksperimento por esplori la universon.

TROVO DE ANTIKORPUSKLO

La nuna esploro montras, ke la universo formiĝis pro eksplodego antaŭ 15 miliardoj da jaroj. Tion subtenas multaj astronomiaj observoj kaj astrofizikaj eksperimentoj. Laŭ teorio de korpuskla fiziko, la eksplodego devas doni egalajn kvantojn da materio kaj antimaterio. En 1932 sciencisto C. D. Anderson trovis pozitivan elektronon (antikorpusklo). Tio pruvis la teorion de P. A. M. Dirac. En 1955 oni produktis antiprotonon. En 1979 sciencistoj akiris 28 antiprotonojn per provbalono alta kiel 60-etaĝa domo. En 1996 la Eŭropa Konsilio de Nuklea Esplorado produktis 9 antihidrogenatomojn, kio vekis grandan atenton de sciencistoj.

Pri ekzisto de antimaterio, inter la sciencistoj estas malsamaj opinioj. Teorie, duono de la universo estas antimaterio. Sed kial la homoj ankoraŭ ne vidis ĝin? Ĉar oni esploris la universon per optika metodo, kiu ne kapablas distingi inter materio kaj antimaterio. Por esplori la antimaterion en la universo, sciencistoj bezonas magnetan spektrokomputilon. AMS (Alfa Magneta Spektrokomputilo) produktiĝis ĝuste por tio.

PROJEKTO DE TING CHAO-CHUNG

Inter la serĉantoj de antimaterio elstaras Ting Chao-chung, Nobel-premiito, ĉin-devena profesoro de Usono. Li gvidas projekton serĉi antimaterion en la spaco. Li diris: "Ni esploras tion, kio estas nekonata de la homaro. Ĝi estas devo de sciencistoj, kiuj faras eksperimentojn." Lia projekto estas sendi al la spaco magnetan spektrokomputilon kun akra sensiveco, kiu registros la devion de objekto kun elektra ŝarĝo trapasanta la magnetan kampon. La projekton partoprenas multaj landoj, inkluzive de Ĉinio.

ĈINOJ KAJ AMS

En serĉado de kunlaboranto, kiu kapablas produkti konstantan magneton, prof. Ting Chao-chung in-



Prof. Ting Chao-chung (la dua de maldekstre) en farejo de allfunkcia magneto en Pekino

formiĝis en 1994, ke la Elektroteknika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj estas forta en teorio kaj praktiko pri konstanta magneto. Ting tre kontentis pri la propono el Ĉinio — produkti magneton el neodimo, fero kaj boro. Tia magneto estas efika kaj ne bozonas elektron. Ĝi solvos la problemon, kiu dum multaj jaroj ĉagrenis la sciencistojn en farado de AMS. Ting donis al ĉinaj sciencistoj la taskon produkti konstantan magneton.

La magneto produktita de Ĉinio kun 1.2-metra diametro kaj 80-centimetra alto pezas 2 tunojn. Laŭ ĝiaj radiusoj troviĝas 64 magnetaj pecoj, tiel la magnetika kampo koncentriĝas en ĝia centro kaj la magnetika liko estas tre malgranda. Tio estas tre grava por la projekto de Ting. Laŭ kutimo, la usona instanco devas trifoje kontroli la instrumentojn, kiujn oni bezonas en la spaca flugo. Tamen la magneto produktita de Ĉinio estis akceptita nur post du kontroloj. Tio estas la unua fojo en la historio.

EBLE FILOZOFIA GLOSO

La 2-an de junio 1998 usona spaconaveto kun AMS komencis la esploron. Jen unuafoje AMS iris en la spacon. Denove la homaro demandas sin: "De kie ni venis?"

Daŭris 10 tagojn la flugo kun celo kontroli la funkcion de AMS en la spaco. En la jaro 2002 AMS estos sendata al la Alfa Spaca Stacio, kie iros eksperimento 3-5 jarojn. Krom antimaterio, AMS serĉos ankaŭ kaŝan materion, kiu konsistigas 90% de la maso de la tuta universo. Se ambaŭ estos trovitaj, pli grandan ĝojon ĝuos eble la filozofoj, ĉar tio estos la plej taŭga gloso por ili.

En Yuanyang



Montvilaĝo

Teksto kaj fotoj de HAI LANG

En la landlima gubernio Yuan-yang, sudokcidenta Ĉinio, loĝas hani-oj, ji-oj, taj-oj, mjaŭ-oj, jaŭ-oj, ĝŭang-oj kaj hanoj. Tie ondas ŝtupar-kampoj, belas antikvecaj montvilaĝoj kaj multas naciaj moroj. Ĉe sunleviĝo la bambuoj kaj ŝtupar-kampoj ruĝe koloriĝas. Ĉe sunsubiro la vilaĝoj, arboj kaj paŝtistoj ore vestiĝas.


La diversnaciaj popolanoj per diligentaj manoj konstruas sian hejmlokon en poezian landon, kiu altiras al si en- kaj eksterlandajn turistojn.




Plugado en mateno



Ôe sunsubiro



Urbeto en nubaro



Nubaro en montaro



Hani-a vilaĝo

Ŝtuparkampoj



Facetoj de kulturo de Hongkong

Ni iam koniĝis al niaj legantoj la vivon de Hongkong-anoj kaj nun ni iom tuŝu ilian kulturon, pri kiu multaj loĝantoj sur la ĉeftero de Ĉinio informiĝis ĉefe el filmoj, furoraj kantoj kaj vestoj. Ĉi-sube ni prezentos opiniojn de malsamtavolaj urbanoj el Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono pri Hongkong-a kulturo. Kvankam supraĵaj, ili tamen montras al niaj legantoj iujn kulturajn trajtojn de Hongkong.

La Red.

de CHEN NAN

HONGKONG-ANOJ KAJ LA LANDO

Meng Zhaolong (studento el Pekino): Samkiel la loĝantoj sur la ĉeftero de Ĉinio, ankaŭ Hongkong-anoj havas fortan nacian dignon. Ili fieras pri la Granda Muro kaj malavare monhelpas lokojn atakitajn de inundo de Yangzi-rivero.



Prezentado ĉe strato

Pro historiaj kaŭzoj Hongkong estis multe influata de la okcidenta kulturo. Post reveno al la patrujo en 1997, ĝi ĝuas altan aŭtonomecon. Pro tio Hongkong-anoj kaj la loĝantoj sur la ĉeftero de Ĉinio diferencas inter si en la pensmanieroj kaj kultura sfero. Hongkong, kie kunfluiĝas la kulturoj orienta kaj okcidenta, prenas la popular-

ajn kaj furorajn kulturojn kiel la ĉefajn. El tio rezultis, ke la kulturo de Hongkong diferencas de la tradicia kulturo de Ĉinio.

Zhang Qing (studento el Pekino): En Hongkong intensas libera konkurenco. Ĉiu organizaĵo kaj ĉiu homo eltenas premforton de la vivo. Tio postulas, ke ili senĉese altigu laboran efikon, por venko en la konkurenco kaj daŭre vivi. Ĝenerale, Hongkong-anoj sin okupas pri faklaboro, en kiu ili lertas, kom-

preneble kun bona efiko. Tial, Hongkong-anoj donas profundan impreson per siaj rapidaj ritmoj: ili rapide iras, manĝas kaj ne multe dormas.

HONGKONG-ANOJ KAJ LA TRADICIO

Chunzi (el Ŝanhajo): Kvankam Ŝanhajo kaj Hongkong tre malproksimas inter si, tamen laŭ mi ŝanhajanoj eble estas plej kompetentaj paroli pri Hongkong, ĉar la prospero de Hongkong iom similas al tiu de la malnova Ŝanhajo. Krome, Ŝanhajo kaj Hongkong havas saman trajton, t.e. ili ambaŭ estas multe influataj de okcidenta kulturo.

Pasinte, Ŝanhajo estis la plej
(Daŭrigo sur p. 47)

Bela



Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

En 1998 mi partoprenis la 83-an UK okazintan en Montpellier de Francio. Vizitinte kelkajn urbojn de suda Francio, mi rimarkis, ke estas admirinde, ke francoj tiel zorge protektas la medion. En Avignon eĉ antikva roma palaco estas perfekte konservata, en ĉemara urbo Nico ĉie videblas kolorriĉaj floroj kaj verdaj herboj, kaj ekster la urbo blankaj nuboj alte pendas super la lazura Mediteraneo. En la kamparo ĉie regas verdo: vinberĝardenoj etendiĝas sur montoj kaj kampoj kaj herboj verdas ĉe ambaŭ flankoj de la vojoj. Mi tute raviĝis de la pejza-

lando — Francio



Statuo antaŭ la Palaco de Versajlo

ĝoj.
Mi sopiras tiujn tagojn, en
kiuj mi promenis en stratoj de

Parizo sub la lazura ĉielo kaj neĝ-
blankaj nuboj kaj ĉe smeralda
akvo.



Antikva kastelo
de Marsejlo



Preĝejo
en Nico



Sunbano en Montpeliero




Promenejo en Nico




Parizo

La ĝardeno de Varsejlo





Sur strato de Montpeliero



La Turo Eiffel



Ĉe strato de Parizo



Sur plaĝo de Nico

Kuriozaj moroj en manĝado

de FENG ZHIZHOU

PRO varma klimato kaj abundo da pluvo la provinco Yunnan, sudokcidenta Ĉinio, riĉas je kuriozaj floroj kaj arboj. Multaj el ili estas manĝeblaj. Tial, en la 26 nacimalplimulto, kiuj vivas en la loko, formiĝis kuriozaj moroj en manĝado.

EKSTERORDINARAJ MANĜAĴOJ

Por la lokanoj la primitiva arbaro servas kiel granda manĝprovizejo. Bongustaj kaj nutroriĉaj estas ne nur fruktoj, sed ankaŭ sovaĝaj floroj, herboj, arboŝelo, radikoj kaj eĉ argilo... Taj-oj preparas rostitajn kukojn nepre kun floroj de boeoj (*Boea hygrometrica*). Printempe, la lokanoj elakvigas muskon el rivero, sekigas kaj fritas ĝin. Jen bongusta manĝaĵo! Primioj ŝatas vinon faritan el genciano kaj lilio. Hani-oj preferas kuiri supon el fiŝoj kaj ŝelo de olivarbo. Derung-oj lertas en farado de dolĉaĵoj el mielo de sovaĝaj abeloj kaj amelo el sapano (*Caesalpinia sappan*)...

La indiĝenoj, kiuj vivas en arbaro, havas kutimon manĝi insektojn. Marmelado el cikadoj kaj frititaj araneoj, iliaj tradiciaj manĝaĵoj kun loka gusto, ne nur bongustas, sed ankaŭ efikas en forigo de febro, doloro kaj inflamo. Taj-oj aparte ŝatas frititajn kokovojn kun formikaj ovo. Va-oj ŝatas kaĉon el plurspecaj vermoj, kiuj parazitatas en herboj kaj arboj. Por ili la frititaj pupoj de sovaĝaj abeloj estas plej bongustaj. Va-oj bredas la menciitajn insektojn. Ili malplenis ŝtupojn, faras multajn truetojn sur ili, poste blokas ilin kaj metas ilin en la arbaron aŭ sur krutaĵon,

kiujn frekventas sovaĝaj abeloj. Do, la lastaj ellasas ovojn kaj produktas mielon en la truetoj... Multaj el la derung-oj aĝas pli ol cent jarojn. Laŭdire oni ŝuldas ilian grandan aĝon al tio, ke ili ofte manĝas pupojn de sovaĝaj abeloj. Frititaj bambuaj vermoj bongustas kiel butero. La vermoj parazitantaj en bambuoj abundas je graso. Ofte oni vaporumas ilin kaj elpremas flavan oleon el ilia ventro por manĝi kune kun glueca rizaĵo. La kuiritaj rizomioj (*Rhizomys sinensis*) estas rigardataj kiel plej bongustaj manĝaĵoj, per kiuj la lokanoj regalas gastojn.

La blang-inoj, kiuj loĝas sur la monto Blango, emas manĝi lateriton, ĉar ĝi utilas por kuraci vomadon, forigi krudan odoron de fiŝoj kaj refreŝigi. Dum la ĝino-inoj, kiuj vivas en la vilaĝoj Mao'e kaj Qiemā, preferas la lokan argilon. Iuj maljunulinoj havas manion manĝi tiun argilon. Ili sentas sin malsanaj, se iutage ili ne manĝas ĝin. Medicina analizo montris, ke tiu argilo abundas je kupro, fero, zinko kaj

aliaj mikroelementoj, bezonataj de la homoj.

NATURAJ KONDIMENTOJ

Nacimalplimulto de Yunnan plejparte ŝatas la gustojn acidan, amaran kaj pikan. En varmega kaj pluva vetero oni preferas preni manĝaĵojn acidajn por havigi al si apetiton, la pikajn por forigi humidecon kaj la amarajn — internan brulumon.

Oni prenas kaj naturajn acidaĵojn el sovaĝaj fruktoj kaj legomoj kaj la mem faritajn, kiaj peklitaj viando, fiŝoj kaj bambuŝoso. Ili fermentigas la acidaĵojn tiamaniere: Unue ili purigas viandon kaj fiŝojn per riza kuirlikvaĵo, due tranĉas ilin kaj miksas ilin kun gluecaj rizaĵoj, trie verŝas vinon sur ilin kaj enpotigas ilin, finfine kovras la poton kaj hermetikigas ĝin per koto el ligna kaj herba cindro por unu monato. Blang-oj preferas acidan teon. Ili bakas freŝan teon kaj konservas ĝin en humida loko, por ke ĝi fermentu. Poste, ili hermetikigas la fer-

Taj-aj virinoj vendantaj lokajn manĝaĵojn ĉe la vilaĝo



mentintan teon en bambua tubo kaj enterigas ĝin, por ke la teo refoje fermentu. Post tio ĝi estas infuzebila kaj trinkebla. Va-oj ŝatas maldolĉan teon. Ili boligas la teon ĝis ĝi fariĝas densa maldolĉega suko kaj eĉ te-marmelado, kiuj servas kiel refreŝigaĵo. Momordiko, ŝoso de plejoblato (*Pleioblastus*) kaj fagopiro estas tre ŝatataj de la lokanoj, kiuj emas manĝi ilin kune kun pulvoro de bova galveziko kiel kondimento.

Kiel spico, ankaŭ sovaĝaj ŝenoprazo, ajlo, zantoksilo (*Zanthoxylum simulans*) estas nemankigeblaj por la lokanoj. Oni aŭ tranĉas ilin en tre maldikajn striojn aŭ faras ilin pasto por miksi ilin kun dishakita koriandro kaj pulvorigita amomo kiel kondimento por acidaj manĝaĵoj.


Nun en Yunnan, kvankam estas sojo, vinagro, glutamato kaj aliaj kondimentoj, tamen oni daŭre preferas tiujn el sovaĝaj plantoj, inkl. de oleo. Lisu-oj elpremas oleon el semoj de lakarbo kaj per tiu oleo ili preparas pladojn, stufas kokaĵojn kaj miksas ĝin kun vino por kuiri ovojn. La tiel faritaj ovoj estas bonega nutraĵo por akuŝintino.

ANTIKVECAJ KUIRILLOJ KAJ MANĜILOJ

En multaj lokoj de Yunnan oni faras la fajrujon el tri ŝtonoj sur kavo kaj rigardas ĝin kiel domon de la Fajra Dio, kiu benas al la familio prosperon. Pro tio, de antikve fajro en la fajrujo ĉiam brulas gardate de la patriarko. Ĝenerale, ĉiu derung-a familio havas plurajn fajrujojn, ĉar, laŭkutime post edziĝo la filoj daŭre loĝas en la hejmo de siaj gepatroj, sed ili devas fari sian propran fajrujon. Ili alterne preparas manĝaĵojn por la tuta familio. Tamen la ĝino-oj havas malsaman kutimon. Se nur la gepatroj ankoraŭ vivas, la filoj ne devas starigi sian propran fajrujon eĉ post sia edziĝo. Tial en grandaj

familioj unusola fajrujo ofte servas por 30 aŭ 40 personoj.

En la epoko, kiam mankis feraj kuiriloj, oni ofte rostis manĝaĵojn. Eĉ hodiaŭ, nacimalplimulto en Yunnan ankoraŭ preferas rostitajn manĝaĵojn. Ili envolvas fiŝojn kaj viandon per baŝoj folioj aŭ ĉirkaŭvolvas ilin per vaniloj kaj rostas ilin super fajro. Ankaŭ per tia maniero ili preparas rizaĵojn. Oni metas rizon infuzitan en bambuan tubon, ŝtopas la truojn kaj rostas ĝin super fajro. Tiam la bambua tubo servas kiel marmito. Post kiam la rizaĵo bone rostiĝis, oni hakas la



Rostitaj fiŝoj

tubon en du partojn. Jen bongusta rizaĵo, dum la duigita bambua tubo servas kiel bovlo.

Antaŭe la lokanoj faris bulon el glueca rizaĵo aŭ metis ĝin sur baŝoj folion por manĝi. Baŝoj folioj utilas vaste. Iuj uzas ilin kiel vinujon. Kaj kiam oni preparas manĝaĵon surkampe post laboro, ili servas eĉ kiel kuirilo. Oni faras fosajon kaj sternas kelkajn baŝojajn foliojn tie, jen la kuirilo, en kiun oni verŝas akvon kaj metas fungojn ĵus kolektitajn, fiŝojn kaj salikokojn ĵus kaptitajn. Kolektinte ĉe rivero rulŝtonetojn, oni varmigigas ilin en fajro, kaj poste metas ilin en la baŝofolian kuirilon, por ke la akvo boligu. Tion oni faras plurfoje ĝis prepariĝo de la bongusta supo.


La primitiva kuirmaniero per ŝtono ankoraŭ vidiĝas en multaj vilaĝoj de la regiono. Primioj ofte metas paston sur ŝtonon varmegan

por prepari patkukon; dum nu-oj kaj derung-oj preferas prepari sur ŝtonplato molan kaj bongustan patkukon el pasto el fagopira faruno aŭ amelo kun birdaj ovoj. Tiuj bluaj ŝtonplatoj kaŝiĝas sub humida tero ĉe la rivero Nujiang en nordokcidenta Yunnan. Ĉe la elteriĝo, ili estas tre delikataj. Oni povas tranĉi ilin en diversajn formojn. Sub la suno ili pli kaj pli malmoliĝas kaj ne fendiĝas eĉ en malvarma akvo post submetiĝo al fajro. Kiam oni preparas kukon per ili, la pasto ne adheras al ili eĉ sen oleo. Pro tio ankaŭ tibetanoj portas ilin hejmen kiel kuirilon, malgraŭ longa distanco.

KUNE ĜUU LA FRANDAĴOJN

Yunnan estas regno de vegetaĵoj. Por danki la favoron de la naturo, la lokanoj kultas la dion Naturo kaj kredas, ke ĉio, kio ekzistas, havas animon. Dum la Novjara Festo, lisu-oj pendigas sur arbo bovlon da rizo plej frue senŝeligita de ili kiel oferaĵo; derung-oj kul-

tas la dion Monto: ĉiuj familioj faras maskon en formo de monto kiel simbolon de la dio, kultas ĝin sur montodeklivo post la domo, bruligas stakon da azaleo, petas sorĉiston fari preĝon, kantas omaĝkanton... Va-oj manĝigas bovlon da gluecaj rizaĵoj al ĉiuj bovoj kaj ĉevaloj por danki ilin pro la helpo al la homaro. Vespere de la Novjara Festo lahu-oj preparas patkukojn kaj metas ilin sur ĉiujn agrikulturilojn, por ke ili ĝuu la festan ĝojon kune kun la homoj. Se vi vizitas hani-an familion en la festaj tagoj, la mastro certe regalas vin, kvankam vi estas fremdulo, per bovlo da rizvino kaj tri dikaj pecoj da viando. Kiam ajn vi gastas ĉe nu-o, ĉiuj familioj de la vilaĝo liveras al vi plej bonajn frandaĵojn. La mastri- no proponas al vi du patkukojn kun rostita viando aŭ fritita ovo, per kio oni deziras al vi feliĉan vivon. ■



Vazo



Tenujetoj

Peniko-lava pelvo



Kolektanto de porcelanaĵoj pri "Ruĝdoma Songo"


Teksto kaj fotoj de HAN HONG

La rakonto pri amo inter Jado kaj Jaspa en la ĉina klasika romano "Ruĝdoma Songo" estas bone konata por multaj ĉinoj. Ĝiaj intrigoj ofte aperas sur pentraĵoj, filmoj, teatraĵoj ktp. Multaj homoj ŝatas kolekti tiajn artaĵojn. Long Jiesheng estas unu el

ili.

Long Jiesheng laboras kiel arkitekto. Influite de la patro, li tre ŝatas kolektadon en la postlaboraj horoj. Antaŭe li estis pasia al filatelo sed nun al porcelanaĵoj. Kiam li ordis siajn kolektaĵojn, li trovis, ke multaj delikataj pentraĵoj sur la porcelanaĵoj temas pri la romano "Ruĝdoma Songo". Do li ekturnis

apartan atenton al kolektado de tiaj porcelanaĵoj. En la lastaj jaroj vizitado de bazaro de la historiaj objektoj fariĝis nemankigebla de lia vivo. Li estas obsedita de la kolektado kaj foje eĉ iris kelkcent kilometrojn por unu porcelanaĵo. Nun liaj porcelanaĵoj pri "Ruĝdoma Songo" nombras ĉ. mil, inter ili estas manĝiloj, teservicoj, vinujoj kaj skribiloj.



Tetasoj

Pleto



Ĉapo-subteniloj



Long Jiasheng kaj liaj kolektaĵoj



Olelampo



Pekino, urbo prefe

Movopleneco kaj prospero, multaj ŝancoj kaj brila perspektivo de metropoloj forte allogas junulojn. En Ĉinio, pro diferenco de ekonomia evoluo, grandaj urboj, kiel Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono, estas magnetaj. Iuj studentoj, kiuj studis en Pekino, post diplomiĝo pli amas ĝin. Iuj havas ideon labori en Pekino, kvankam la okupo ne interesas ilin, ekz. Wang; post foriro de Pekino iuj revenis pro amo al ĝi, ekz. Jia; iuj fondis familion kaj havas infanon, tamen por kariero venas al Pekino, ekz. geedzoj Liu. En Pekino ili vivas malfacile, iom senhelpe, tamen kun ĝojo kaj espero.

Yu Tao

de YIN QIN

KIAM mi estis en infanĝardeno, mi scipovis la kanton: Mi amas Tian'anmen de Pekino. Kiam mi estis 18-jara, mi ekstudis en Pekino, kaj Tian'anmen fariĝis mia unua vidindaĵo.

Post studado mi eklaboris en Pekino. Ĉiujare en la Nacia Festo mi vizitis Tian'anmen.


Kiel magneto, Pekino brakumas ĉiun, kiu amas ĝin.

POR FARIĜI PEKINANO

Kiel diplomito en 1998, Wang sentis ke li ne estas fortuna. Kiam li venis el Henan-provinco kaj ekstudis en Pekino, li deziris fariĝi pekinano, tamen tio neblis, ĉar en Pekino loĝantoj ege multas.

Simpligo de administra strukturo, reenoficigo de senlaboriĝintoj, rekorda nombro de tutlandaj diplomitoj... Tio ĉagrenis Wang.

Wang studis pri kontado. Antaŭ kelkaj jaroj ĝi estis multe bezonata, sed nun ne. Liaj gepatroj jam trovis okupon por li en la hejmloko, tamen tion li



rinda

rifuzis por persiste studi la fakon ĝis la fino.

En la universitato li bone studis, sciis uzi komputilon kaj veturigi aŭtomobilon. Li sendis aŭtobiografieton al dekkelkaj dungantoj. Du monatoj pasis, neniŭ respondo venis. Februare li ĉeestis dungokunvenon. En homamaso li sentis ke li estas tre malgranda. Li metis la aŭtobiografieton inter la aliajn kaj esperis ke la dungantoj ne ignoros lin. Tagmeze, kiam li forlasis la kunvenejon, li vidis ke en la halo atendas multaj homoj por sia afero posttagmeze.

Reveninte de la kunveno, Wang telefonadis al dungantoj laŭ telefonlibro. Tamen neniŭ definitive respondis al li.

En 1998 en Pekino estis 58 mil diplomitoj, el kiuj 40 mil ne estis pekinanoj. Laŭ regulo de Pekino nur 10% de la 40 mil povis resti en Pekino.

Alproksimiĝis la tago de diplomitiĝo. Malespera, Wang hazarde ricevis telefonaĵon el mezlernejo pri testo. Portante okcidentan kostumon pruntitan de kunlernanto, Wang staris antaŭ testanto. Finfine li far-

iĝis instruisto.

Tamen instruado ne interesis lin. Li devis fariĝi instruisto, ĉar li volis resti en Pekino. Li preferis labori kiel kontisto.

“PENDANTA AMO”

Jia diplomiĝis el universitato de Pekino.

Ŝi ŝatis modernan dramon kaj muzikon. Dum la 4 jaroj en la universitato ŝi ofte vizitis teatron kaj koncertejon de Pekino.

Ŝia hejmurbo en suda Ĉinio estas ekonomie evoluinta, sed kulture neriĉa.

La gepatroj esperis ke ŝi edziniĝos frue. Tamen ŝi ne havis emon kaj restis fraŭlino.

Ŝia kunlernanto en Pekino funkciigis komputerkompanion kaj invitis ŝin kunlabori. Jia senhezite iris al Pekino, ĉar ŝi amis Pekinon, precipe ĝian intensan kulturan etoson.

En la kompanio ŝi estis okupita. Helpe de ŝi, la kompanio bone funkciis.

En Pekino ŝiaj kunlernantoj geedziĝis kaj iuj havis infanon. Ili ĉiuj estis okupitaj. Ĉiusemajnfine ŝi estis sola kaj ofte vizitis bufedejon. Kunlernantoj svatis al ŝi fraŭlojn. Tamen ŝi opiniis ke mankas al ili io. La soleca Jia ŝajne ne havis emon al teatro.

Iutage Jia ricevis el la hejmloko leteron de tiu, kiu kaŝe amas ŝin kaj sin svatis al ŝi. Jia sciis, kial ŝi ne trovis amon en Pekino. Ŝi falis en dilemon. Ŝi volis resti en Pekino, tamen tiu, kiu petas ŝian manon, estis en la hejmloko, kion fari?

DONU HEJMON AL LA FILO

Liu kaj lia edzino estis kunlernantoj de universitato. En norda Ĉinio kun filo ili vivis modeste kaj dolĉe.

La edzino esperis ke ili lukros pli multe. Tial ŝi konfidis la filon al sia patrino kaj venis al Pekino. Dank’ al sia laborsperto kaj flua fremda lingvo la geedzoj sukcesis eniri en iun alilandan kompanion kaj havis bonan salajron.

Ili luis apartamenton proksime de la kompanio, la lupago okupis trionon de la salajro. Ili estis tiel okupitaj kaj laboris ofte ne en sama tempo, ke preskaŭ neblis por ili renkontiĝi en la hejmo. Pasis la antaŭaj neriĉaj tamen dolĉaj tagoj.

Tiam la edzino eksopiris al la patrino kaj filo. Ili multe pagis por telefonado, tamen tio ankoraŭ ne povis mildigi la sopiron. Tial la patrino kun la filo venis al Pekino.

Kun la filo la familio fariĝis tiu en vera senco. Tamen la patrino ne alkitimiĝis al la vivo en Pekino. Ŝi foriris, la geedzoj konfidis la filon al infanĝardeno, kaj pro tio ili multe pagis.

Vespere de la Aŭtunmeza Festo la familio manĝis en restoracio. La edzino demandis la edzon, kiam ili fariĝos gemastroj. La edzo respondis, ke ŝajne li devas serĉi pli bone salajratan okupon. ■



Strutobredejo




Elkoviĝinte, la strutido devas vivi en kovilo 2-3 tagojn.



Observado de 10-tagaj strutidoj



Afrikaj strutoj



Transloĝiĝo de strutoj

Fotoj de DING WEIGUO


En 1996 la Limigita Kompanio (Grupo) Ruida de Ĉinio kaj la Limigita Kompanio de Unuigitaj Farmejoj Robert Hunt de Kanado kune investis 13.8 milionojn da juanoj en Ningxia, regiono sur la Leŭsa Altebenaĵo de Ĉinio, kaj fondis birdobredejon kun 210 dromiceoj kaj 42 afrikaj strutoj el Kanado.

La 42 afrikaj strutoj pare loĝas en stalo. La virstrutoj kun brilaj nigraj plumoj altas 2.5 metrojn kaj pezas 130 kilogramojn, kaj la inaj estas grizaj kaj iom malgrandaj. Ĉiujare strutino demetas 80-120 ovojn. En la

pasintaj du jaroj la kvanto de ovoj demetitaj de tiuj strutinoj atingis 1 500, el kiuj 450 estis sukcese elkovitaj per koviloj.

La bredejo havas 4 kovilojn kun aŭtomataj temperatur-reguligilo kaj ovoturnilo. Ĝenerale post 42-taga kovado strutidoj eloviĝas, kaj post pliaj 10 tagoj ili pezas 2-3 kilogramojn.

La karno de strutoj estas ne nur bongusta, sed ankaŭ proteinoriĉa. Ĝi estas tonika manĝaĵo kun malmultaj graso kaj kolesterolo; la felo estas mola, delikata kaj altkvalita; el la ŝelo diafana oni povas fari belajn artaĵojn; kaj eĉ la graso estas bona materialo de kosmetikajoj.



Strutoj

Dum la batalo kontraŭ inundo

● Kiam aviadilo flugis super la regiono suferanta de inundo, Gao Haipeng pretervole ekstremis pro maltrankviliĝo. La urĝsava marko sur la pojno komprenigis lin, ke la danĝero estas multe pli grava ol oni imagis.

● Dum duontago post alveno al la regiono suferanta de la katastrofo Gao Haipeng kaj liaj kolegoj kuracis pli ol 500 malsanulojn, sed la plej grava kaj danĝera estis, ke la suferantoj de la katastrofo ankoraŭ ne konsciis, ke la medio, en kiu ili vivis, jam serioze poluiĝis.

● Kvankam Gao Haipeng kaj liaj kolegoj alprenis diversajn rimedojn kontraŭ eventualaj epidemioj, tamen ankoraŭ ekzistas la latentaj danĝeroj.

de XIANG HONG

KIAM aviadilo flugis super la regiono suferanta de inundo, Gao Haipeng pretervole ekstremis pro maltrankviliĝo. Li rimarkis, ke liaj kolegoj, kiuj gaje babilis dum la vojaĝo, fariĝis seriozaj. Rigardate tra fenestro de la aviadilo, Yangzi-rivero fluas orienten kvazaŭ flava rubando, sed Gao kaj liaj kolegoj klare sciis, ke Yangzi-rivero ne estas tiel kvieta kiel ĝi vidata de la aero. Pro abundo da pluvego Yangzi-rivero inundis kampojn, detruis vilaĝojn kaj ruinigis la domojn de sennombraj homoj. Dum du monatoj dekmiloj da ĉinoj gardis la digon de la rivero tage kaj nokte kaj

brave batalis kontraŭ la superakvego.

Kiel membroj de la unua kuraca taĉmento sendita de la ĉina Ministerio de Publika Sano, Gao kaj liaj 11 kolegoj el la Ĉina-Japana Amikeca Hospitalo flugis al la katastrofita regiono. Kvankam ili pretis riski

sian vivon por la batalo, tamen vizaĝe al la superakvego, precipe kiam la taĉmentestro ordonis ilin fiksi la urĝsavan markon sur la pojno, ili ĉiuj komprenis, ke la danĝero estas multe pli grava ol oni imagis. Sur la urĝsava marko legiĝis la nomo, sangogrupoj kaj telefon-numero de la portanto. Ligite al la pojno, ĝi estas malfacile forprenebla, pro tio oni nomas ĝin ankaŭ rubando de la vivo. Portante kun si medikamentojn kun valoro de pli ol 100 mil juanoj kaj apar-



Transportado de medikamentoj al suferantoj de la inundo

tojn kun valoro de pli ol 300 mil juanoj, Gao kaj liaj kolegoj alvenis al la regiono inundita de Yangzi-rivero.

LA DUA DEFENDA LINIO

La loko, kien venis Gao kaj liaj kolegoj, troviĝas en la meza baseno de Yangzi-rivero kaj estis serioze atakata de la katastrofo. Tie ili vidis, ke sur la 14-kilometra digo staras unu apud alia portempaj tendoj, kaj ĉie estas armeanoj en kamuflaj vestoj kaj oranĝaj sav-veŝtoj, kun laca mieno kaj vultuaj okuloj. En la aero regis streĉa atmosfero antaŭ alveno de diluva pinto. Oni dorse transportis 50-kilogramajn sablo-sakojn por konstrui branĉan digon. Inter tiuj homoj Gao sentis sin ege trankvila.

En la temperaturo je pli ol 40°C, li estis ĉiam banata de ŝvito kaj kaptita de soifo. La superakvego estis multe pli vasta kaj furioza ol oni imagis. Sur la vasta akvosurfaco vidiĝis tegmentoj kaj arboj, hazarde alflosis tablo, lavpelvo... Gao kaj liaj kolegoj turnis sian atenton al suferantoj de la katastrofo. Atakite de kruela suno, vento kaj fiinsektoj kaj pro troa laceco kaj poluciita akvo, multaj homoj sur la digo malsaniĝis je dermozo, lakso kaj oftalmito. Dum duontago post alveno de la kuraca taĉmento pli ol 500 malsanuloj estis kuracitaj. Gao kaj liaj kolegoj konsciis la gravecon de la problemo. Kvankam lokaj kuracistoj venis tuj post la inundo por kuraci kaj preventi malsanojn al la loĝantoj suferantaj de la katastrofo, tamen latentaj danĝeroj de epidemioj troveblis ĉie en la regiono: Ne sciante, ke la vivmedio jam serioze malpuriĝis, la loĝantoj en la regiono kiel kutime trinkis akvon el la rivero; sur la digo, kie vivis centmiloj da homoj, eĉ ne troviĝis necesejo. La lokaj kuracistoj, kiuj peneme laboradis tuj post la inundo, estis jam elĉerpitaj. Pro tio Gao kaj liaj kolegoj trovis peza sian respondecon. En la sama nokto ili ellaboris "Propono Kontraŭ Epidemioj" por la tuta lando. En ĝi ili konigis la seriozan staton de malsanoj kaj epidemioj minacantaj la regionon suferantan de superakvego kaj alvokis al la lokaj kuracistoj doni al la lokanoj fundamentajn sciojn pri sanprotektado kaj memprotektajn rimedojn. La propono estis tuj sankciita de la ĉina Ministerio de Publika Sano kaj eĥita de diverslokaj kuracistoj. Kuracaj taĉmentoj oficvojaĝis unu post alia al la regionoj atakitaj de superakvego, samtempe la ŝtato kolektis diversajn medikamentojn el la tuta lando kaj urĝe transportis ilin al la regionoj inunditaj. Oni povas diri, ke kiam centmiloj da armeanoj kaj loĝantoj donis grandan atenton al ĉiu eventuala danĝero ĉe la digo, la kuracistoj atenteme zorgis pri eventualeco de epidemio.



Disdonado de materialoj pri kontraŭepidemiaj scioj

BATALO ANKORAŬ NEFINITA

La superakvego, okazinta en la somero de 1998, kaŭzis grandan perdon al la ĉina popolo, sed samtempe, en la batalo kontraŭ ĝi oni vidis la solidarecon kaj la potencon de la ĉina nacio.

Tion multe spertis Gao. Li konfesis, ke li venis al la katastrofita regiono ĝuste pro tio, ke al ĝi mankis kuracistoj. La patrujo kaj la popolo kulturis lin en medicinan doktoron, kaj nun estis tempo por li rekompenci ilin per sia servado. Li diris, ke la membroj de la kuraca taĉmento estis elektitaj el multnombraj kandidatoj; estro Xu Shuqiang, kiu oficvojaĝis unu semajnon en Tibeto, telefone anoncis sin por aliĝi al la kuraca taĉmento. Gao diris ankaŭ, ke la soldatoj en la aĝo de 18-19 jaroj foje-refoje baris furiozan superakvon per ŝpato, sablo-sako kaj eĉ per sia korpo. Preskaŭ ĉiuj ĉinoj partoprenis per sia propra maniero en la batalo kontraŭ la inundo. Tial, dum la duonmonato en la katastrofita regiono, kvankam la temperaturo en la tendo superis 50°C tage, taĉmentanoj dormis nur 4-5 horojn nokte kaj ofte satigis sin per biskvitoj, tamen, krom kuracado, ili ankaŭ disdonis medikamentojn por purigi akvon, instruis al la lokanoj anti-sepsi trinkakvon, gvidis ilin forigi rubon, helpis al ili konstrui provizorajn necesejojn... Kiam la dua kuraca taĉmento venis en la lokon por anstataŭi ilin, Gao kaj ĉiuj liaj kolegoj bruniĝis kaj maldikiĝis pro laceco kaj alta temperaturo.

Kvankam la superakvego retiriĝis kaj oni jam komencis rekonstruadon en la katastrofitaj regionoj, tamen eventualaj epidemioj minacos la regionojn almenaŭ duonjaron. Kiel kuracistoj, Gao kaj liaj kolegoj ankoraŭ atentis pri la batalo ankoraŭ nefinita post reveno al Pekino. ■



Defie al dezertiĝo

Ĉinio havas tre multe da dezertaj areoj. Mi volas scii pri la posedo, kultivado kaj asimilado de la dezertoj en Ĉinio.

ĈINELJOR PETR NIKITIĈ (Rusio)

de JI PING

EN la antikveco Loulan-regno, kiu situis en la nuna Xinjiang, estis loko kun prosperaj arbaroj, abundo da herboj, sufiĉe da akvo kaj multe da loĝantoj. Sed kiam la homa historio eniris en la 3-an jarcenton, la regno malaperis. En la libroj verkitaj de post la 4-a jc estas diversaj supozoj pri la kaŭzoj de ĝia malapero, tamen el ili estas io komuna kaj konvinka, t.e. ĝi estis englutita de dezerto, sekve de tio ĝi fariĝis senhoma dezerto kun solaj urbomuroj.

Estas maltrankvilige, ke nun dezertoj en Ĉinio daŭre englutas pli ol 2 000 kvadratajn kilometrojn ĉiujare. En la lando la dezertoj kovras entute 2.622 milionojn da kvadrataj kilometroj, kiuj konsistigas 27.3% de la totala teritorio de la lando, kaj ĉiujare la dezertiĝo perdigas al nia lando 54 miliardojn

da juanoj.

KIO KAŬZIS LA DEZERTIĜON?

La esplorado kaj multe da historiaj arkeologiaj materialoj konigis, ke la kaŭzoj de dezertiĝo, kiun oni nomas "tera ulcero", kuŝas ne nur en la klimata ŝanĝiĝo, sed ĉefe en la arbitra ekspluatado de la tero.

Antaŭ 30 jaroj en Ulanqab de Interna Mongolio regis prospero, kiel priskribita en la poemo:

*Sub la ĉielblu' sen baro
La paŝtejo vastas kiel maro,
Kiam vent' kliniĝas herbojn,
Ekaperas bovoj kaj ŝafoj en aroj.*

Sed poste pro grandarea senherbigo por gren-kulturado la ekologia medio grave malekvilibriĝis. Tie estas la vilaĝo Gongjia, kie ses monatojn de ĉiu jaro furiozis sablovento, kiu ĉiufoje postlasis tavolon da sablo dikan je ĉ. du metroj. Tiam oni devis forŝoveli la sablon.

Se ne, en la pluva sezono pro la granda pezo de la humida sablo la kabanoj povus fali.

Glicirizo estas plurjara herbo uzata por kuraci tuson kaj malmultigi mukon. Oni diris, ke elradikigo de ĉiu glicirizo dezertigas grundon en la ĉirkaŭaĵo de 3-5 m. Sole en Yanchi-gubernio, Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, miloj da kamparanoj en la lastaj jaroj faris konstantan elradikigon de glicirizo, kaŭze de kio estis detruitaj 100 000 hektaroj da stepo, el kiuj pli ol 1/7 komplete dezertiĝis (en la gubernio la stepo kovris entute 120 000 hektarojn).

DEZERTIĜO ESTAS SUBIGEBLA

Jam en la 50-aj jaroj oni komencis la laboron por preventi kaj subigi dezertiĝon en la lokoj multe suferantaj de dezertiĝo. La ŝtato establis nombron da kontraŭdezertaj

institucioj. Sciencistoj trovis herbojn kaj aliajn plantojn taŭgajn por kreski en dezertoj kaj rekomendis ilin al pli vastaj lokoj. Oni povas diri, ke la ĉefa laboro por batali kontraŭ dezertiĝo estas kulturaj arbojn kaj herbojn. Dank' al sia penado Ĉinio jam konstruis arojn da artefaritaj oazoj en trosekaj kaj duonsekaj lokoj, kaj en multaj lokoj realiĝis la deziro, ke "dezerto pli kaj pli malkresku". La 570 000 hektaroj da flusablo en la subprovinco Yulin, Shaanxi-provinco, estis senmovigitaj kaj aperis tie multe da novaj vilaĝoj. En Dangcaidan-vilaĝo, Interna Mongolio, la flusablo englutis multe da tero kaj paŝtejoj, sekve de tio loĝantoj devigite migris aliloken, tamen la restintaj



Herboj fidel plantitaj en dezerto por senmovigi sablon

vilaĝanoj kulturis en la dezerto multe da mongolaj salikoj, dank' al tio la flusablo estis senmovigita kaj la vilaĝo liberiĝis el dezertiĝo. Tial la migrintoj revenis en la hejmlokon. Nun tie ĉiu familio havas averaĝe du putojn, du *mu*-ojn da bone irigaciataj kampoj (15 *mu*-oj egalas unu hektaron), du *mu*-ojn da fruktoĝardeno. El la kreskintaj mongolaj salikoj oni prilaboras materialojn por mebloj, dume la kamparanoj daŭre plantas novajn salikojn por teni la lokon en eterna verdeco.

En norda, nordorienta kaj nordokcidenta Ĉinio, kie etendiĝas la mondfama Granda Muro, nun prosperas verda koridoro, kiu far-

iĝos 4 480 km longa kaj 560-1 460 km larĝa. Oni nomas ĝin "Verda Granda Muro". De 1978 ĝis 1995 oni arbarizis tie entute 20 milionojn da hektaroj da kampoj. En la komenco de la 70-aj jaroj tie nur 5.05% de la tero estis kovritaj de arboj, sed en la jaro 2050 tiu nombro kreskos al 14.95%.

En la batalo kontraŭ dezertiĝo ĉinaj sciencistoj sukcese kreis pli ol 100 novajn teknikojn efikajn por preventi kaj subigi dezertiĝon. Ĝis hodiaŭ per aviadiloj Ĉinio semis herbosemojn sur miliono da hektaroj da dezertoj. La 5-an de majo 1993, en nordokcidenta Ĉinio okazis ekstreme granda sabloŝtormo, kiu kaŭzis erozion al la tero profunda je 90 cm. Sed la sabloŝtormo ne kaŭzis perdon en la loko, kie aviadiloj semis herbosemojn.

En la dezerto Taklimakan de Xinjiang, konata kiel "Maro de Morto", nun estas konstruata ŝoseo 446 km longa samtempe kun la petrola ekspluatado. La senbarecon sur tiu ŝoseo garantias la kontraŭsabra arbara sistemo ĉe la ŝoseo. La Lanzhou-a Dezertologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu faris multajn kontribuojn al la laboro por preventi kaj subigi dezertiĝon, estis difinita de UN kiel Internacia Centro por Preventi kaj Subigi Dezertiĝon.

SABLA INDUSTRIO

En 1984 fama ĉina sciencisto Qian Xuesen diris, ke ankaŭ la dezerto Gobio estas tera riĉfonto. Proponite de li, establiĝis sabla industrio en dezertoj. Komence de la 90-aj jaroj lia teorio pri sabla industrio estis aprobita de koncerna departemento de la ŝtato kaj praktikata en iuj regionoj.

La totala areo de dezertoj en Interna Mongolio konsistigas preskaŭ trionon de tiu de Ĉinio. Kaj tie jam aperis sabla industrio. La silici-sabla kompanio de la regiono havas 10 minejojn. Ili prilaboras sablon en bonkvalitajn industriajn materialojn, kiuj vendiĝas al 12 provincoj kaj municipoj, por fari vitron kaj ŝtalajn muldaĵojn.

La tekniko kulturaj rizon sur sablejo estis bone aplikata en Daliushu-forstokulturejo en 1994 kaj la hektara produktokvanto atingis naŭ tunojn.

Tie estas fabriko, kiu produktas rabotajajn tabulojn el mongolaj salikoj, kiuj kreskas sur areo de pli ol 500 000 hektaroj. Tie oni ankaŭ faras manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el hipofao (*Hippophae rhamnoides*) kaj aliaj vegetaĵoj.

La sunenergio, ventenergio kaj petrolo en la dezertoj estas valoraj riĉfontoj por la homoj. En februaro 1997 la ĉina registaro ekpraktikis la principon pri ekspluato de dezertoj, t.e. "kiu transformos la dezerton, tiu profitos de ĝi", kun la celo preventi kaj subigi dezertiĝon, utiligi riĉfontojn en la dezertoj kaj disvolvi tie la sablan industrion per diversaj metodoj.

La reguligo de dezertoj en Ĉinio atingis sukcesojn, tamen tio estas ankoraŭ tre malproksima de radikala haltigo de serioza dezertiĝo. La tasko de Ĉinio por batali kontraŭ dezertiĝo estas ankoraŭ tre malfacila.

La batalon kontraŭ dezertiĝo bezonas ne nur la daŭra disvolviĝo de la ĉina ekonomio, sed ankaŭ la plibonigo de la tergloba ekologio kaj akcelo de la homa civilizacio. Pro tio la ĉina registaro subskribis en 1994 kontrakton de UN pri prevento kaj subigo de dezertiĝo kaj ellaboris projekton kontraŭ dezertiĝo, kiu difinis la celon de Ĉinio en la proksima, meza kaj malproksima estonteco. Ni kredas, ke post multjara penado la ekologia medio kaj ekonomia disvolviĝo en la dezertoj eniros en kontentigan staton. ■



Antaŭ la prezentado

"Jen, tio estas pli bona!"

Letalaj tajicjuan-prezentantoj

Tajĝiĉjŭan-prezentado

Teksto kaj fotoj de ZHAO XI kaj LIU SIGONG

La 15-an de oktobro 1998 sur la vasta Tian'anmen-placo okazis la grandioza *tajĝiĉjŭan*-prezentado, organizita de la Ĉina Uŝu-a Asocio.

Tajĝiĉjŭan, brila perlo en la trezorejo de ĉina uŝu-o (antikva batalarto), estas grava metodo por sanigo.

Dek miloj da homoj partoprenis en la prezentado, inter ili estis maljunuloj, geknaboj, ŝtatoficistoj, sciencistoj, instruistoj kaj studentoj, homoj de aliaj profesioj, reprezentantoj de la hejmloko *tajĝiĉjŭan*, Yongnian-gubernio, Hebei-provinco. Ankaŭ diplomatoj kaj studentoj de aliaj landoj, *tajĝiĉjŭan*-amatoroj de Usono, Koreio kaj Aomen partoprenis en la grandioza prezentado.



Tajĝiĉjŭan-prezentado sur Tian'anmen-placo



Allilandaj *tajĝiĉjŭan*-amatoroj



Sinpreparo por la prezentado



Fiŝkaptistoj ĉe maro

Posteuloj de la maro

de WEI GUOXIONG

ĜING-OJ estas ĉina nacimalplimulto, tamen eĉ en Ĉinio oni malmulte konas ilin, ĉar ili estas malmultaj kaj vivas ne sur la ĉeftero de Ĉinio, sed sur tri insuloj en Beibu-golfo.

LA UNUJAJ LOĜANTOJ DE LA INSULOJ

La folkloristoj nomas la ĝing-ojn nacio de la maro. En Ĉinio ili estas la unika nacimalplimulto vivanta ekskluzive sur maraj insuloj kaj vivtenas sin ĉefe per fiŝado. 20 mil ĝing-oj vivas ĉefe sur la insuloj Wutou, Wanwei kaj Shanxin sub la administrado de la urbo Fangcheng de Guangxi.

Antaŭ pli ol 400 jaroj la supre menciitaj insuloj estis kovritaj de densaj arbaroj. Dank' al la varma subtropika klimato la loko estis favora por sovaĝaj bestoj, kiaj serpento, boao, tigro kaj leopardo. Ĝing-aj maljunuloj diris, ke iliaj prapatroj venis al la insu-

lo Wutou en 1511.

VIVI DE LA MARO

La maro garantias la vivon de ĝing-oj. Ĝi influas ĉiun parton de ilia vivo. Fiŝado estas ilia plej grava okupo. Krome ili ankaŭ faras terkulturadon kaj entreprenas salfaradon, komercadon kaj diversajn metiojn, kiuj ĉiuj strikte rilatas al la maro. La unuaj loĝantoj de la insuloj fiksloĝiĝis tie ĝuste pro tio, ke al ili plaĉis la bona natura fiŝejo de Beibu-golfo. La tradicia fiŝkaptado kaj iliaj bambuaj domoj malaltaj kaj malgrandaj ne multe ŝanĝiĝis eĉ ĝis la komenco de la 90-aj jaroj. Antaŭe ili fiŝis ĉefe en malprofunda maro, kaj nur de la lastaj 20-30 jaroj ili komencis fiŝadi en profunda maro sur motora velŝipo kaj prilumita boato.

Fiŝado sur maro estas okupo ekskluzive de la viroj, dum virinoj kolektas krabojn, konkulojn k.a. sur plaĝoj. Por eviti eventualan danĝeron sur la maro la fiŝistoj ofte laboras arope kun sperta fiŝisto kiel gvidanto. Li ĉiam per bukcena trumpetado konigas

al siaj subuloj alvenon de fiŝaro kaj tajfuno. Je la jarfino oni okazigas solenan kultron al la mara dio, por ke tiu protektu la fiŝistojn sur la maro. Spertaj fiŝistoj ne nur povas bone antaŭscii fluson kaj malfluson, ŝanĝiĝon de la vetero sur la maro, sed ankaŭ bone konas leĝojn pri movado de diversaj fiŝaroj.

SOLENA FESTO

Kanto-festo, la plej solena por la ĝing-oj, okazas por rememori la kantofeon, kiu instruis kantojn kaj dancojn al la ĝing-oj kun la celo mobilizi la popolon kontraŭ despotismo. Memore al lia justa konduto, la ĝing-oj konstruis kanto-pavilionojn el eritrofleo (*Erythrophloeum fordii*).

La festo okazas ĝenerale en tiaj pavilionoj. En la loĝloko de ĝing-oj troviĝas 4 tiaj pavilionoj, el kiuj la plej nova estis konstruita antaŭ pli ol 200 jaroj.

Nur viroj, kiuj atingis difinitan aĝon, rajtas partopreni aktivadon en la pavilionoj, dum la virinoj — nur aŭskulti kantadon ekstere. Tiam kaj viroj kaj virinoj, ĉu junaj, ĉu maljunaj, ĉiuj en festaj vestoj kolektiĝas ĉe la pavilionoj. Plenuminte hejmajn laborojn, ili kun ĝojo venas ĝui toreadon kaj luktadon far de viroj. En la festo la plej alloga programero kompreneble estas kantado: Du knabinoj kantas alterne kaj unu knabo ludas muzikilon por ilin akompani. La enhavoriĉa festo daŭras tri tagojn kun amafero kiel la eterna temo.

Sendube, gejunuloj tre ŝatas la festajn spektaklojn, kiuj donas bonajn ŝancojn al ili por kontakto. Sub hela luno kaj sur ora plaĝo la gejunuloj duope aŭ triope sin amuzas. Ili levas per piedpinto sablon al sia amato kaj ĵetas disŝiritajn foliojn al sia amatino por sondi ties koron. Se gejunuloj korinklinas unu al la alia, ili kune foriras de la homamaso.

STREBO AL BELA ESTONTECO

La ĝing-oj ĉiam strebas al bela vivo. Hodiaŭ ili havas pli da ŝancoj realigi sian deziron. Nun la averaĝa jara enspezo de la loĝantoj de Wutou-vilaĝo jam atingis 7 000 juanojn (1 USD = 8.3 juanoj). Kun tiu sumo la vilaĝanoj ja povas esti rigardataj kiel bonhavuloj en Ĉinio. Ilia ĉefa okupo restas la sama kiel antaŭe, tamen kun pli racia labordivido. Nun la fiŝkaptado, mara bredado kaj landlima komercado estas iliaj tri gravaj okupoj. Ili invitis fakulojn el Taiwan por kulturiteknikistojn pri peneobredado. Dank' al la bredado, prilaborado de kaj komercado per la marproduktaĵoj la ĝing-oj pli kaj pli sin riĉigas. Iuj junuloj mem establis prilaborejon de marproduktaĵoj kaj ilia entreprenado fariĝis pli kaj pli granda.

Nun la ĝing-oj havas monon por konstrui instruan domon, ŝoseon, maljunulejon kaj kablan televidostacion. Dank' al la konstanta leviĝo de ilia vivnivelo, en la lastaj jaroj en ilia loĝloko okazis neniu grava kriminala afero. ■

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* S-ro Ye Su, instruisto de la angla lingvo, ŝatas lingvistikon, dez. kor. tm. Esperante, precipe kun greka kaj izraela lingvistoj, interesiĝas pri angla kaj Esperanta instruado, kaj diversaj temoj. Adr.: Shengli Xiaoxue, CN-412200 Liling, Hunan, Ĉinio.

* Deziras kor. tm. pri ĉiuj temoj jenaj bulgaroj: Asja Hristova, 40-j., str. Opalĉenska 17; Pepa Velikova, 50-j., str. Ruen 15; Hranimirka Atanasova, 23-j., str. L. Karavelov 22. Komuna adreso: 5180 Polski Trambes, Bulgario.

* Miroslav Majersky, vendisto, dez. kor. Adr.: T.G. Masaryka 42, 549 01 Nove Mesto n/Met, Ĉeĥio.

* Liska Jaroslav, 37-j. skolto, volas interŝanĝi leterojn, bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun gesamideanoj el la tuta mondo. Adr.: Sidliste Svobody 19/71, 796 01 Prostejov, Ĉeĥio.

* S-ro Gerard Mansel dez. kor., interesiĝas pri arkeologio. Adr.: 17 rue Armatrong, B.P. 1963, Noumea, Nouvelle Calédonie, Nov-Kaledonio.

AMUZO

Du humuraĵoj

Malrapide iri en pluvo

Pro pluvego ĉiuj hastas sur strato, sed iu homo iras tre malrapide. Oni miras kaj demandas al li: “Kial vi ne iras rapide?” La homo aplombe respondas: “Estas vane. Jen, ankaŭ antaŭe pluvas.”

Kuiri bambuaĵon

Iu nordano gastis en la sudo, tiea loĝanto regalis lin per bambuŝoso kuirita.

Li demandis: “Kio tio estas?”

La sudano respondis: “Bambuaĵo.”

Reveninte hejmen, la nordano sopiris al bongusto de la bambuaĵo kaj kuiris sian bambumaton, sed neniel povis fari ĝin manĝebla. “Kiel ruza la sudano estas!” li kolere diris al sia edzino.

Solvoj de la enigmoj de la januara numero: limako, sunfloro, arakido kaj akvo.

Vivo de maljunuloj

Ĉinoj ofte diris: "La filo garantios la maljunecon de la gepatroj". Tio montras, ke la maljunuloj deziras prizorgadon de siaj gefiloj. Nun en Ĉinio, precipe en urboj, estas nova fenomeno: iuj maljunuloj konfidas sian lastan vivon ne al siaj gefiloj, sed al la socio. Do, kia estas ilia vivo?

de SHU MEI

EN Ĉinio, preskaŭ ĉiu deka homo estas pli-ol-60-jara. Tial, en parkoj kaj ĉe stratoj, ĉie videblas maljunuloj. Iliaj vivkondiĉoj diferencas kaj ili pasigas sian vivon laŭ sia propra maniero.

La patro de mia amiko estas pli-ol-70-jara. Li ofte sola turisme vojaĝas al aliaj lokoj. Ĉeloke li ĉiam telefonas al mia amiko por informi, ke li estas en paco. Ni admiras la aktivecon de la maljunulo, kiu hodiaŭ estas en tiu ĉi urbo, kaj morgaŭ estos en alia urbo malproksima. Ĉinoj diris: "70-jarulo estas malofte videbla." Sed nun verŝajne ĉiuj juniĝas, tial oni diras: "70-jarulo estas frateto, 90-jariĝo ne estas malofta." Koncerna statistiko montras, ke la averaĝa vivdaŭro de ĉinoj estas 76 jaroj.

80-jara Wang Xiuqing estas kamparanino. Ŝi havas tri filojn. Ĉiutage, post manĝoj ŝi venas al la vilaĝa enirejo, kie kun samaĝuloj ŝi babilas sidante sur benketo. Kun kontento ŝi ofte rakontas, ke ŝiaj tri filoj donas monon por vivteni ŝin, la bofilinoj bone prizorgas ŝin, eĉ la du pranepoj ofte kombas al ŝi la harojn.

En la ĉina kamparo multaj maljunuloj estas prizorgataj de sia familio, same kiel Wang Xiuqing. En la urboj estas diversaj manieroj pri tio. Ĉ. triono de maljunuloj en Pekino ne loĝas kun siaj gefiloj, kaj parto el ili estas prizorgataj en maljunulejoj. Pli multaj maljunuloj ricevas helpon de la servocentroj de loĝkvartaloj.

Aprile de 1998, en Dongcheng-distrikto de Pekino la loĝantaraj komitatoj starigis maljunulajn ĉambrojn por akcepti maljunulojn senhelpajn, aŭ ne loĝantajn kun siaj gefiloj, aŭ havantajn malfacilaĵojn por vivi memstare. Nun estas ĉ. 500 tiaj ĉambroj ĉiu kun 4-5 maljunuloj kaj 2-3 servistoj. Li Lanjun, 77-jara emerita instruistino, de 1989 estas malsana kaj ne povas prizorgi sin mem. Ŝiaj filo kaj bofilino estas kriplaj. En la maljunula ĉambro ŝi ĝuas favoran prezon de manĝaĵoj, kuracistoj regule venas ekzameni kaj kuraci ŝin, frizisto venas servi al ŝi per hartonda-

do kaj junaj volontuloj ofte venas purigi la ĉambron, babilas kun ŝi kaj helpas ŝin en korpo-ekzercado. Ŝi diris, ke ŝi vivas en ĝojo.

Por plezurigi la maljunulojn oni aplikas novan metodon "varti maljunulojn kune kun infanoj". Pro naskolimigo malmultiĝas infanoj en ĉinaj infanĝardenoj, el kiuj iuj superfluaĵoj do kunlaboro kun koncernaj institucioj funkcigas vartejojn por akcepti ankaŭ maljunulojn.



Regula korpo-ekzameno por maljunuloj

En tia "vartejo" mi vidis, ke en la supra etaĝo estas infanoj kaj sube loĝas maljunuloj. Estas amuzejo kaj sportejo, kie la maljunuloj rigardas televidan programon, legas gazetojn, ludas kartojn kaj ŝakon, faras korpo-ekzercadon...

Kun la infanoj, ili ĝuas ĝojon de familio kaj sentas sin rejuniĝantaj. La infanoj kantas kaj dancas por ili kaj donacas al ili memfaritajn manlaboraĵojn.

La servistoj multe trankviligis la gefilojn de la maljunuloj. 74-jara Xu suferas de amnezio. Antaŭe ŝia filo ĉiam timis dum laboro, ke al ŝi okazos hejme eventuala malfeliĉo pro la malsano. En la "vartejo" ŝi ofte faris strangaĵon — helpis aranĝi manĝilojn, sed forgesis kien meti; ordigis vestojn por aliaj, sed mem portis ilin. La aliaj komprenas, ke ŝi estas forgesema, tamen helpema. Ĉiuj estas toleremaj al ŝi. Ŝia filo estas kontenta, ke ŝi vivas en tre plezuriga etoso.

En la nuna Ĉinio ĉefe familio kaj loĝkvartalo prizorgas maljunulojn. Sed pro diversaj kaŭzoj por la familianoj estas pli kaj pli malfacile mem prizorgi la maljunulojn, tial estas urĝe bezonata la plenamplaksa socia sistemo por prizorgi ilin. ■

Internacia konkurso de infan-deseĝnaĵoj

La Kultur-Domo de la urbo Milanowek kaj Esperanto-Grupo ĉe la Kultur-Domo invitas 6-18-jarajn infanojn kaj adoleskulojn en la tuta mondo al konkurso de infan-deseĝnaĵoj, kiun oni organizas en kunligo kun la 100-jara jubileo de Milanowek en 1999.

La temo estas "Mia malgranda patrujo". La partoprenanto de la konkurso prezentas sian plej proksiman ĉirkaŭaĵon en la familio, lernejo, urbo aŭ vilaĝo aŭ scenojn pri la ĉiutaga vivo, tipaj festoj, familiaj solenaĵoj, kutimoj ktp. Unu partoprenanto rajtas sendi maksimume du konkursaĵojn en formato A-3 aŭ proksima laŭ la grandeco. La konkursaĵo povas esti ordinara deseĝnaĵo nigrablanka aŭ farita pere de kolorigaj deseĝnokrajonoj,

penetraĵo farita per ordinaraj farboj aŭ oleofarboj, akvarelo aŭ kombinaĵo kun surgluitaj folioj de floroj, rizograjnoj k.s. Ĉe la supra dekstra aŭ maldekstra angulo estu algluita malgranda foto de la kapo de aŭtoro. Dorsflanke de la konkursaĵo oni skribu tre legeble la personan kaj familian nomojn de la aŭtoro kaj precizan adreson, ties aĝon kaj titolon de la konkursaĵo. La limdato de la alsendo de la konkursaĵoj estas 15-a de aprilo 1999. La premiojn kaj diplomojn oni dissendos al la infanoj per poŝte ĝis la fino de junio 1999. Sendu la konkursaĵojn al: Miejski Osrodek Kultury, ul. Koscielna 3, 05-822 Milanowek, Pollando


Respondeculoj de la konkurso estas Aleksandra Magierecka kaj Andrzej Pettyn.

Belaj fotoj dezirataj

De la januara numero de 1999 la rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj" aperas sur p. 2. Ĉiunumere ni aperigas unu foton. Por ke la rubriko pli plaĉu al la legantoj, ni deziras bonajn fotojn, kiuj temas pri naturaj pejzaĝoj kaj naciaj moroj. Ne taŭgas portretoj kaj personaj fotoj.

Dankon pro viaj subteno kaj kunlaboro!

La Red.



Horizontale

A. - - Rezigno pri puno. B. Malsane en urino. - Spirgaso. - Kri'. C. Ligos per ĉenoj. Ĉ. Antaŭsciigo. - En rado. - Mov'. D. - - - - Havos temon. E. Pec'. - Prefikso. - Demandvorto. - Longa tempo. F. - - Ejon por loĝi kaj manĝi. G. Arkojn. - Balt'. - Flava metal'. Ĝ. Femala dombesto. - Mallonge evitu. - H. Frakcion. - Helena dio de milito. - Pezunuo por diamanto. Ĥ. - - Odoron. I. Bulbon. - Movon en akvo. - Krude manĝos. J. Dokumento. - - Vertikale

1. Avel'. - Subjunkcio. - Past' el kakao. 2. Epok'. - Forteventaj. 3. Malgrandan. - Ceremonio. - Artikolo. 4. Akvobird'. "Trinkaj". 5. Homa brust'. - Spiritan atmosferon. - Suf. de futuro. 6. Supoz'. - Loko. 7. Ŝmirkovraĵ'. - Patro de patro. 8. En vipo. - Pecon. 9. Indiano. - Malplenigi butikon. 10. Seniĝi de posedaĵo. - Rifuzis. 11. Kolektaĵo. - Balt'. - Kazon. 12. Maŝino. - Duo (R) 13. Homa organo. - Multekosta "kokinaĵ". 14. Lumbriko. - Freŝa. - Ir'. 15. Distingil'. - Parolanta. 16. Straton. Aŭdeble esprimiĝos.

La kvadratoj kun ringoj enhavas konsolan frazon al la solvontoj.

Lennart Persson (Svedio)

VENTUMILO EN ĈINA TEATRO

La ventumiloj estas uzataj por movi aeron kaj refreŝigi la movanton, tamen sur la scenejoj de ĉinaj teatroj ili havas aliajn funkciojn. En antikvaj ĉinaj teatroj multaj aktoroj tenas ventumilon en la mano por montri la intrigon kaj karakteron de personoj. Sur scenejo la aktoroj kantante skuas ventumilon por montri la sociajn poziciojn kaj karakterojn de diversaj personoj. Ĝenerale dirite, ĝentilaj intelektuloj ventumas al sia brusto, impertinentuloj al sia ventro, arlekenoj al siaj okuloj kaj virinoj per ventumilo ŝirmas sian buŝon. En la antikva Ĉinio oni tenis malsamajn ventumilojn: la homoj en la socia fundo tenas grandan ventumilon el folioj de tifao (*Typha*), junaj sinjorinoj kaj belaj servistinoj — rondan ventumilon el silko, stabestro kaj konsilistoj — pluman ventumilon. En la teatro pri historiaj eventoj de la Tri Regno (220-280)



Aktorino kun ventumilo

Zhuge Liang, ĉefkonsilisto de Shu-regno, kiu poste fariĝis ĝia ĉefministro, ĉiam tenas pluman ventumilon en la mano. En Ĉinio Zhuge Liang estas figuro de saĝo kaj prudento. En krizaj momentoj lia ventumilo helpis al li sin trankviligi kaj pensigi. Tial en Ĉinio oni nomas konsilistojn “personoj kun

pluma ventumilo en la mano”. Krom tio, sur scenejo la edzino kaj kromedzinoj de imperiestro estas ĉiam sekvataj de palacaj knabinoj alte tenantaj grandajn ventumilojn kun figuro de fenikso.

VIZITO DE INDUSTRIAJ ENTREPRENOJ

En la lastaj jaroj iuj turismaj servoj de Ĉinio sin okupis je turismo al industriaj entreprenoj. Tio estas tre ŝatata de la publiko. En tia turisma vojaĝo oni povas rigardi filmon pri industria produktado, viziti fabrikojn, iliajn produktajn liniojn kaj ekspozicion de iliaj produktaĵoj kaj oni povas ankaŭ aĉeti produktaĵojn aŭ memoraĵojn faritajn de tiuj entreprenoj.

Por la homoj, kiuj neniam vizitis fabrikojn nek minejojn, vizito de industriaj entreprenoj estas ne malpli alloga ol tiu de la naturaj pejzaĝoj. Dum vojaĝo al la Delto de Perla Rivero oni vizitis multajn entreprenojn de hejmaj elektraj aparatoj kaj eksciis, kiel produkti fridu-

jojn kaj elektrajn kuirpotojn. La korporacio Changhong en Sichuan-provinco estas la plej granda bazo de koloraj televidiloj en Ĉinio. Inter la vizitantoj estas ne nur ordinara turistoj, sed ankaŭ akciuloj de tiu ĉi korporacio kaj administrantoj de entreprenoj. Por akceli industrian turismon la Ĝenerala Ĉina Aviada Kompanio

ekfunkciigis turisman servon por transporti turistojn al Chengdu, Xi'an, Guiyang, Nanchang kaj aliaj malfermitaj urboj kaj faciligi al ili viziton de la tieaj fabrikoj de aviadiloj, kio estas tre ŝatata de la amatoroj de aviado. Tiam la vizitantoj povas propraokule rigardi, kiel produkti aviadilojn militajn, ŝarĝajn

kaj bombajn kaj helikopterojn, tiel ke ili havigas al si ĝeneralajn sciojn pri fabrikado de aviadiloj.

PLEZURŜIPOJ SUR LA OKCIDENTA LAGO

La Okcidenta Lago de Hangzhou estas mondfama pro siaj belaj pejzaĝoj. La turistoj raviĝas ne nur de la krispa lago, sed ankaŭ de diversaj plezurŝipoj sur ĝi.


Jam en Tang-dinastio (618-907) la Okcidenta Lago famis tra la tuta lando, samtempe kun tio, ekfamis ankaŭ la tieaj plezurŝipoj, plejparte bele lakitaj. En la kajutoj estis tabloj kaj seĝoj destinitaj por festeno, sed tiam nur riĉuloj povis ĝui tiajn ŝipojn.

Sur la Okcidenta Lago funkciis ankaŭ malgrandaj boatoj kun pintaj pruo kaj poŭpo. Antikve ili estis ĉefaj transportiloj sur la lago. La alilokaj pilgrimantoj plejparte veturis per tia boato al templo por fari religian aktivadon.

Poste iuj boatoj ekhavis seĝojn sur si kaj blankan tolsirmilon kontraŭ la suno kaj pluvo. Ili servis speciale por turistoj.

En tiaj boatoj turistoj povis ĝui la belajn pejzaĝojn sur la lago. En la turisma sezono sur la lago lante moviĝis multe da boatoj kun blanka tolsirmilo.

Nun sur la Okcidenta Lago estas ankaŭ alispecaj boatoj, kiaj boato movata per akumulatoro, sampano kaj granda boato kun gravuritaj traboj kaj pentritaj kolonoj. Por ke la lago ne estu poluita, tie estas malpermesata ĉia dizelŝipo.



Turistoj sur la Okcidenta Lago

ZONO DE DONG-OJ

La dong-aj infanoj vivis tre longe sur la patrino dorso. Pro tio la zono de dong-a virino fariĝis aparte interesa.

Ne estas troigo diri, ke ĉiu zono de la dong-aj virinoj estas bela metiartaĵo. Sur tiaj zonoj estas bildoj de suno, luno, stelo, natura pejzaĝo, birdo, besto, floro, arbo, fiŝo kaj insekto. Por la dong-aj knabinoj la bildoj sur la zono ofte montras la nivelon de ilia brodado. Antaŭ sia edziniĝo la knabinoj devas zorgeme fari zonon kiel sian doton. Ili kun plena atento brodas zonon por enkorpiĝi sian belan aspiron al la estonteco en la bildo sur

la zono.

La zono estas ne nur ornamento, sed ankaŭ praktika. Ĉu en hejma laboro, ĉu en terkulturado, la virinoj ĉiam portas sian zonitan bebon sur la dorso. En la terkultura sezono de la dong-aj vilaĝoj ĉie sur la kampoj videblas virinoj kun bebo zonita sur la dorso.

En la dong-aj vilaĝoj la virinoj rigardas la zonon kiel talismanon por siaj gefiloj kaj ankaŭ ligilon inter si kaj ili. Ie en la dong-aj vilaĝoj, kiam la zono difektiĝas kaj la bebo grandiĝas, la patrino do purigas kaj konservas ĝin kiel eternan memoraĵon, el tio videblas la valoro de la zono en la okuloj de la dong-aj virinoj.

(Daŭrigo de p. 24)

profunde influata de okcidenta kulturo en Ĉinio kaj nun, eble Hongkong anstataŭis Ŝanhajon tiuflanke.

Kvankam Hongkong estis okupata de britoj pli ol cent jarojn, tamen Hongkong-anoj ĉiam obstine tenis sian tradicion. Ekz. maljunaj Hongkong-anoj parolas nur kantonan dialekton, sed junuloj miksas en ĝin la anglan.

Por ŝanhajanoj Hongkong estas iom provinca. En la hotelo Paco de Ŝanhajo maljunaj artistoj, kiuj ĉesis ludi ĵazon antaŭ ĉ. duonjarcento, povas ĝin ludi tiel bone kiel antaŭe. Tion Hongkong-anoj probable ne atingas. Sed famaj kaj eminentaj Hongkong-aj artistoj gajnas tre multe, kio estas neimagebla en Ŝanhajo. Hongkong-aj scenejoj estas tre altnivelaj kaj modernaj, sed al ĝiaj multaj programeroj mankas ia grandanimeco kaj seriozeco; same, kvankam Hongkong-aj televidaj programeroj estas vaste rigardataj, tamen ili estas malpli fajnaj ol tiuj sur la ĉeftero de Ĉinio; kvankam Hongkong-anoj multe vidas la mondon, tamen ili ankaŭ superstiĉas...

HONGKONG-ANOJ KAJ AKADEMIA ESPLORADO

Yu Hua (verkisto el Guang-dong): Mi dufoje vizitis Hongkong, sed ĝi ne donis al mi profundan impreson. Dum mia duafoja vizito al Hongkong mi loĝis en la Ĉinlingva Universitato de Hongkong, kiu impresis min per sia akademia etoso eĉ pli densa ol tiu sur la ĉeftero de Ĉinio, sed al ĝia akademia esplorado mankas akreco.

AMY (funkciulo el reklama kompanio): La hongkong-a kulturo estas malferma kaj moda. Oni povas libere montri siajn opiniojn kaj laŭplaĉe sin esprimi. Artaj temoj kaj formoj abundas kaj varias, sed kelkfoje estas tre liberaj kaj frivolaj. ■

Avo kaj nepo (Novelo)

de CHI ZIJIAN

SUR miaj piedoj estas leĝeraj kaj varmaj feltbotoj, kiujn maljunulo Hu Da donacis al mi. Li estis la plej karakterohava el miaj konatoj en Wuhui-urbeto. Neĝego retenis min en la gubernia urbo de Tacheng por tri tagoj. Tiam Hu Da veturigis min en Wuhui-urbeton per ĉeval-sledo. La maljunulo estis pli-ol-70-jara kaj portis malpuran mantelon el kapra felo. Li ŝatis kunporti kalabason kun vino ĉe la brusto, kiu pro tio ĉiam estis pufa. Dum veturado, irado aŭ aĉetado li de tempo al tempo elprenis la kalabason kaj sin plezurigis per vino. Malalta kaj maldika, tamen ne ĝiba, li ĉiam rapide piediris. En mia unua punkto en la urbeto, li, ebriiĝanta, vizitis min. Antaŭ ĉio li deklaris, ke li ne havas malbonan intencon kontraŭ mi. Mi komprenis, ke li ŝercas, ĉar li aĝas kiel mia avo. Poste li ekfanfaronis pri la beleco de siaj iamaj amatinoj. Li diris, ke ili havas blankajn dentojn, sed la miaj grizas kiel musa fekaĵo; iliaj okuloj estas lumaj kiel oleplenaj lampoj; kaj iliaj manoj estas delikataj, sed sur miaj manoj estas fendetoj de frosto. Kuraĝigate de lia humureco, mi ŝerce demandis lin, pro kio la virinoj amis lin malgraŭ lia malalteco. Li eksplodis per tremvoĉa rido pli orel-ŝoka ol ploro. Li diris, ke la virinoj amis lin pro lia metilerteco. Li scipovis fari ne nur veŝton kaj ĉapon el led, sed ankaŭ el betuloŝelo lulilon, boaton kaj ujojn por salo, akvo, rizo kc. Krome, li scipovis ankaŭ kuraci malsanojn, kiaj anemio, dismenoreo kaj lumbalgio. Mi demandis:

“Ĉu per akupunkturo?”

Trinkinte iom da vino, li diris: “Per drogherboj. Sur monto ĉie estas trezoro.”

Li diris, ke li havas kvar filojn, tri bofilinojn kaj nombron da genepoj; antaŭ nelonge mortis la plej aĝa bofilino. El la genepoj li plej ŝatis Yuwen, filon de la dua filo. Li diris, ke inter li kaj Yuwen ekzistas psika induko. Foje sur la monto unu el liaj ĉevaloj estis vundita je la kruroj, premate de trabo. Tio nebligis al li malsupreniri la monton. Tiam Yuwen estis ludanta globetojn sur la terlito en la hejmo. Subite li diris al la patro, ke la avo ne povas malsupreniri la monton pro vundiĝo de la ĉevalo. Kun dubo la dua

filo de la maljunulo veturigis la ĉeval-sledon al la monto. La infano ja pravis.

Tiun nokton Hu Da vizitis min por rigardi mian kaŝtankoloran ledkofron. Jam en la gubernia urbo de Tacheng li interesiĝis pri ĝi. De la terlito mi portis la kofron al la stovo proksime kaj malfermis ĝin. Ĉe la sono de la malfermo preskaŭ tremis liaj maldikaj orelkonkoj. Ŝovinte sian kapon en la kofron, li per du fingroj prenis kaj serioze rigardis unu post alia la objektojn en ĝi, kun vizaĝaj esprimoj jen de surpriziĝo jen de seniluziiĝo. Kiam li vidis negliĝon, liaj okuloj montris unue doloron kaj poste koleron, ĉar en la veston mi envolvis pupon. Laŭ lia opinio, tio sufokos ĝin. Li konis fotilon, tamen ne miniaturan diktafonon. Mi do surmetis al li aŭdilon kaj aŭskultigis al li muzikon. Li estis tiel konsternita, ke li saltis kaj ĵetis sur la plankon la kalabason: “De kie venis la muziko?” Kiam mi helpis lin demeti la aŭdilon, li murmuris: “La muziko ne estas bona, tro brua.”

Sufiĉe esplorinte mian kofron, la maljunulo demandis min, kiom da tagoj mi restos en la urbeto, ĉu mi sentas timon. Mi diris al li, ke mi restos ĝis la venonta printempo kaj sentas nenion timiga, ĉar en mia urbo mi loĝas unuope. Li diris: “Se vi sentos timon, mi venigos Yuwen por akompani vin.”

Aŭdinte ke mi venis por pentrado, li diris, ke kelkajn jarojn antaŭe pentristo vizitis la urbeton. Li iom kontraŭpage pentris ekskluzive virinojn. Poste iu viro rimarkis, ke la korpo de lia edzino estis pentrita de la pentristo. Kune kun aliaj viroj li forpelis la pentriston el la urbeto. Mi tuj esprimis, ke mi havas intereson nur pri pejzaĝo, sed ne pri homa korpo. Ŝajne sperta, li diris: “Ĉu en la pejzaĝo ne estas homfiguro?”

La sekvantan matenon mi rimarkis paron da feltbotoj sur neĝo antaŭ mia domo. Mi demandis najbarinon pri la anonima donacinto. Rigardante la botojn, ŝi diris sen ia ajn dubo: “Tio estas laboraĵo de maljunulo Hu Da.”

Nun ni turnu nian parolon al la fasko da pajloplektitaj moneroj, kiun donacis al mi Yuwen. Estis tagmezo. Fininte tagmanĝon, mi estis rostanta melonsemojn ĉe la stovo. Puŝmalfermis la pordon kaj eniris knabo en blua kotonkapoto, kun froste ruĝiĝintaj vangoj kaj nazfluo. Neatendita varmo en la ĉambro

trakuris lin, kiu demandis:

“Ĉu mi povas interŝanĝi viajn varojn?”

“Tamen kiu vi estas?”

“Ĉu vi ne informiĝis pri mi Yuwen?” li fiere diris, kvazaŭ ne koni lin estus mia kulpo.

Mi ekridis. Yuwen elsinigis faskon da pajloplektitaj moneroj kaj diris al mi:

“Ĉi tiuj 21 moneroj estas plektitaj de mi. Kvankam ili ne valoras kiel veraj moneroj, tamen ili estas pli belaj ol la veraj.”

Mi demandis, kion li deziras. Li respondis, ke antaŭ ĉio li volas rigardi miajn varojn. Mi do montris al li bagatelaĵojn, inter kiuj la ruĵujo kaptis lin. Same kiel la avo Yuwen estas malalta kun maldikaj orekonkoj, tamen li havas okulojn grandajn kaj lumajn kaj estas pli babilema ol la avo. Li demandis min, ĉu



mi pasigos la Printempan Feston en la urbeto. Mi kapjesis. Ĝojiĝinte, li plu demandis, ĉu mi donacos al li monon, se antaŭvespere de la Printempa Festo li surgenuje riverencos kap-al-tere por saluti min. “Kompreneble jes.” Evidente mia respondo kontentigis lin, ke li ire-reire paŝis en mia ĉambro kaj rakontis al mi rakontojn pri fantomo, kiujn li aŭskultis ĉe maljunuloj. Ĉe vesperiĝo venis lia avo. Enirinte li tuj diris:

“Mi scias, ke vi venis ĉi tien. Ĉiam vi tuj vizitas fremdulojn por interŝanĝi ion. Kion vi akiris hodiaŭ?”

Ridante Yuwen malfermis la ruĵujon. La maljunulo riproĉis: “Tiel juna vi dandas. Por kio vi bezonas ĝin?”

Poste de najbaroj mi informiĝis, ke Hu Da sola vivas kaj malofte vizitas la filojn escepte de festotagoj. La gastoj en vintro ĝenerale estis transportataj de li per sledo. Li elektis la pli mallongan vojon en la monto por ŝpari tempon. Kiuj ajn la gastoj estis, Hu Da observis senescepte iliajn kunportitajn objektojn. Tion li faris eble pro sia profesia bezono. Mi informiĝis ankaŭ, ke li lernis operludon en sia infanaĝo kaj aktoritis en opertrupo. Lia patrino estis favorata

aktorino. Foje prezentante en urbeto de suda Ĉinio, ŝi estis ŝatata de la urbetestro, kiu perforte kromedziniĝis ŝin kaj samtempe ordonis ensakigi ŝian edzon kaj dronigi lin. Tiel Hu Da perdis la gepatrojn kaj ekvagis de sudo al nordo. Li sin okupis sinsekve pri rikiŝotirado, pedikurado kaj kuirado. Finfine li ekloĝis en la urbeto Wuhui. Por li estis netolerebla operludo, eĉ ĉia muziko.

En Wuhui-urbeto malfrue tagiĝis. Nur je la 8-9-a horo la suno pale leviĝis. La neĝo blankigis la montojn proksimajn kaj malproksimajn. Iam estis malfacile por mi klare vidi tra fenestro kuirfumon super la domoj, kiu kunfandiĝis kun la ĉielo. La loĝantoj estis amikaj al mi. Tiam estis la lasta monato laŭ la luna kalendaro. Ili gastigis min. Mi rekompence ornamis iliajn litmurojn per koloraj bildoj. Mi pentris lotusflorojn sufiĉe belajn. Antaŭvespere de la Printempa Festo sur la muroj de preskaŭ ĉiuj domoj gluiĝis bildoj de dio de riĉeco pentritaj de mi. Ĉiufoje ili preparis manĝaĵon por havi miajn pentraĵojn. Tiam mi pensis, ke ne estas malbone pentri terlit- kaj porddiojn en tiuj kaj aliaj urbetoj.

Kiel ornamaĵon mi pendigis sur muro la pajlajn monerojn de Yuwen kaj ventumkorbon el betuloŝelo, fajroprenilon, birdokaĝon kaj sekigitajn guŝojn. Mia sendormeco resaniĝis sen kuracado, ĉiunokte mi dolĉe dormis kaj ĉiumatene mi frue ellitiĝis kiel la lokanoj. Kelkfoje mi iris al la rivero por rigardi ilin fiŝkapti...

En la najbara familio mi pasigis la antaŭvesperon de la Printempa Festo kaj formanĝis teleron da *ĝiaŭzi*-oj. Tuj post kiam mi eniris mian domon, puŝe malfermiĝis la pordo. En frosto infano senĉese riverencis al mi kap-al-tere. Estis neniu alia ol Yuwen, kiu venis saluti min. Laŭ la promeso mi donacis al li 50 juanojn por beno. Kun la mono Yuwen diris, ke li volas aĉeti fajraĵojn por pasigi kun la avo la Lanternan Feston en la dekkvina de la unua monato laŭ la luna kalendaro. Mi demandis lin, ĉe kiu lia avo pasigis la antaŭvesperon de tiu ĉi Printempa Festo. Li ridis turnante la kapon: “Ĉu ne kiel en la pasintaj jaroj? La avo iom restis ĉe ĉiu sia filo kaj hejmen revenis kun la manoj post la dorso.”

Kiel plenkreskulo Yuwen rakontis al mi pri sia avo: la maljunulo fumis unu cigaredon en la hejmo de la plej aĝa filo, konsilis al li pli frue reedziĝi, por ke la manĝotablo ne plu estu olepolvo-plena; poste li iris al la hejmo de la dua filo, kie Yuwen riverencis al li kap-al-tere. Tiamaniere Yuwen akiris donacojn en ĉiu antaŭvespero de la Printempa Festo: akridokaĝo, musokaptilo, gantoj el leporledo, dometo farita el pinkonusoj en la pasintaj jaroj kaj leda kolringo por hundo ĉi-foje. La maljunulo gustumis unu *ĝiaŭzi*-on, kies nesala farĉo malplaĉis al li. En la hejmo de la tria filo li manĝis unu bombonon kaj rimarkigis malbonan gludadon de la lanternoj, sur kies surfaco la

blankaj gluomakuloj aspektas kiel likeno. Finfine estis vico de la plej juna filo. Tie la maljunulo manĝis unu arakidan grajnon, flarsentis malbonan odoron de la peklita brasiko kaj kuntirante la brovojn foriris.

“Ĉu la avo tiel pasigis ĉiun fojon?” demandis mi.

“Jes,” Yuwen diris, “li ŝatas nur min. En ĉiu Lanterna Festo mi gajigas lin per fajraĵoj.”

Matenon de la Lanterna Festo, kun la resta varmo de la stovo mi kuntiriĝis en la lito. Haste venis la najbarino kaj diris al mi, ke maljunulo Hu Da malaperis. Mi ne sciis, ke “malapero” fakte estas eŭfemismo de “morto”. Ŝi diris al mi, ke frumatene Yuwen estis fingrumanta la fajraĵojn, tiam li falis de la litrando sur la plankon, kaj la kapo ricevis ŝvelaĵon. Neatendite li diris, ke li vidis la avon baldaŭ mortonta kaj vokanta lin. Rapide li kuris al la hejmo de la maljunulo, kiu efektive kuŝis sur la terlito kaj suspiradis. Kiam li vidis la nepon, larmoj tuj plenigis liajn okulojn. Elbuŝiginte la vorton “opero”, li spiris la lastan spiron.

“Opero?” demandis mi.

“Jes,” respondis la najbarino.

En la hejmo de la maljunulo mi vidis Yuwen en blanka funebra vesto. Liaj okuloj fariĝis pli lumaj, eble malsekigitaj de larmoj. Rigardante min, li mi-

enis triste kiel plenkreskulo. Tiun nokton, por montri sian senton al la mortinto, multaj urbetanoj maldormis en lia domo. Neestingiĝa lampo tremis en la frosta vento. Yuwen bruligis la fajraĵojn kaj senĉese diris:

“Avo, jen fajraĵo simila al krizantemo!”

“Avo, tiu ĉi blankas kiel neĝo!”

“Avo, tiu ĉi aspektas kiel akvoverŝo!”

Ŝajne la maljunulo vere vidis tion per siaj aliaj okuloj.

La maljunulo forpasis, kaj la urbeto perdis brilan figuron. Preskaŭ ĉiun tagon en la de li donacitaj feltbotoj, kun varma humoro mi memoris lin. Certe eminenta estas lia metiarto, preskaŭ ĉiuj kudreroj estis kaŝitaj interne, kaj ĉe la botrando estas subtilaj garnaĵoj. Post la funebra ceremonio Yuwen ofte vizitis min, sekvate de flava hundo kun kolringo, la lasta laboraĵo de la maljunulo. Ĉe mi Yuwen lernis pentradon de dio de riĉeco kaj pordo-dio, ĉiufoje foruzante unu blankan paperon. Unu semajnon poste li preskaŭ scipovis pentri, tamen li preferis pentri la barbon de dio de riĉeco kiel nubon, longan kaj malpezan. ■

(Elĉinigi XIANG HONG)


Nova libro de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Jarfine de 1998 aperis nova libro “Noveloj el Antikva Ĉinio”, kun 554 paĝoj, en formato de 15x21 cm.

Novelo de Ĉinio havas longan historion kaj tre abundajn verkojn. Antaŭ ĉirkaŭ 2 000 jaroj en Ĉinio jam aperis la literatura formo “novelo”. Sed tiam la ekspliko por “novelo” estis tute malsama al la difino de la nunaj ĉinoj kaj eŭropanoj. La tiamaj noveloj fakte estis nur raportaĵoj faritaj de subaj oficistoj por la imperiestroj pri la onidiroj kaj anekdotoj de plebanoj. La verkintoj kolektis di-

versajn onidirojn kaj aldonis komentariojn kaj kunmetis ilin en malgrandan libron. Iom post iom la ekspliko por novelo pli kaj pli preciziĝis kaj tre abundiĝis noveloj en la vera senco. La noveloj en frua tempo estis mallongaj kaj la intrigoj simplaj, kaj poste noveloj fariĝis pli kaj pli longaj kaj enhavoriĉaj, kaj ankaŭ retoriko pli kaj pli komplektiĝis. Novelo mallonga okupis unu aŭ duonan paĝon, dum longaj kelkajn kaj eĉ dekojn da paĝoj.

Nia Esperanta kolekto de noveloj de antikva Ĉinio enha-



vas 46 verkojn kun 19 ilustraĵoj de diversaj stiloj. Ni esperas, ke niaj legantoj trovos por si interesajn pecojn.

Prezo: 26.00 USD

Seddokosto: 5.00 USD





Filigrana emajlaĵo

— vinujo sur anaso

Emajlaj metiartaĵoj havas historion de preskaŭ mil jaroj en Ĉinio. Por fari emajlaĵon oni devas unue pulvorigi kvarcon, kaolinon, borakson kaj iujn ercojn, fandi ilin kaj poste per ili ŝmiri la metalan korpon, antaŭ ol ĝin malvarmigi. Jen pretiĝas la metiartaĵo fortika, korodimuna kaj tre bela.

La vinujo sur anaso, alta je 30.5 cm., estas orita emajlaĵo kun kupra korpo. La anaso estas emajlita je filigranaj plumoj sur helblua fono kun lotusfloroj kaj diagramo de supera ekstremo. La delikata artaĵo, farita en 1736, estas konservata en la Ĉina Muzeo de la Imperiestra Palaco.





Gasto-bonveniga Pino sur Huangshan-monto

Foto de Wang Digong

ISSN 0032-4361



02>

9 770032 436009

世界语《中国报道》一九九九年第二期
(本刊代号: 二—九—五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2